


KD 53488



H. SENTIS

URSO 

En montoj

ORIGINALE VERKITAJ EN
LINGVO ESPERANTO . . .



PARIS — 1906.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33

120

H. SENTIS

URSO 

En montoj

ORIGINALE VERKITAĴ EN
LINGVO ESPERANTO . . .




PARIS — 1906

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33

K1

53488



Antaŭparolo

— « *Vi neniam verkis ion; kaj vi komencas skribante en Esperanto. Duobla danĝero!* »

— « *Tute kontraŭe, mia amiko, ĉar mi esperas ke mia rakonteto profitos la intereson vekitan de la nova lingvo, kaj estos indulgita pro ĝi.* »

— « *Mi komprenas; vi fidis je la proverbo: bona saŭco akceptigas malbonan fiŝon.* »

— « *Via proverbo estas flata nur duone. Tamen ĝi estu feliĉa antaŭdiro!* »

★

N. — En la Fundamento, kelkaj verboj estas, laŭ unu traduko, nur transiraj, laŭ alia, samtempe transiraj kaj ne transiraj. Mi akceptis ĉi tiun duoblan sencon; ĉar la formado de netransira verbo per aldono de l'sufikso « iĝ » estas ofte neĝusta uzo de tiu ĉi sufikso.

U R S O

I.

En la salono de hotelo, apud la stacidomo, en la Alpa urbeto Brigian, junulo promenis kun videbla senpacienco. Li estis elegante vestita, havis ovalan iom longan vizaĝon, sufiĉe regulan, harojn kaj barbon blondajn, kaj bluajn okulojn, kiuj ŝajnis elokventaj. Kredible, laŭ la okazoj, ili fajre kolerus aŭ ame karesus ; sed nun, ili klare komprenigas per neatenta esprimo, kaj subitaj returnoj al la pordo, ke nia juna viro atendas iun. Ĉiuminute li rigardas la horloĝon, kiu indikas* la dekan horon matene ; kaj tiu okupado sukcesis nur fari la atendadon pli enua. La montriloj estas malkomplezaj, kaj ĉiam marŝas laŭ irmaniero, kontraŭa al la dezirata.

Fine brueto aŭdiĝis, kiu haltigis, kaj iom paligis la promenanton. La pordo malfermiĝis, kaj bela bruna junulino, en blanka lana robo, eniris, tenante, en la maldekstra mano, dikan bukedon de blankaj floroj. Ŝi ankaŭ estis pala, sed la rekta rigardo de ŝiaj nigraj okuloj, kaj la firmeco de ŝia marŝado, montris deci-

(*) *Indiki* L. I. indicare ; A. indicate ; G. anzeigen ; F. indiquer. H. indicar.

deman naturon. Ŝi etendis la manon liberan al la juna viro, kaj, per voĉo iom emociita :

— « Bonan tagon, sinjoro Deltur ; paĉjo volís ke mi veñu sola, por nia unua fianĉa renkonto. Mi obeis. »

Sinjoro Deltur kisis la malgrandan manon, kaj komencis, per tremanta voĉo :

— « Mi estas tre danka al sinjoro Meral, fraŭlino Berto ; sed al vi ankaŭ. Mi ne scias kiel vin danki . . . »

Li haltis. Li estis preparinta tute alian paroladon ; sed forgesinte, pro la emocio, la ĝustan eniron, li ne sciis efektive kiel atingi la bonan vojon. Al lia konfuzita mieno, Berto ridetis ; kaj ŝia propra ĝeno malaperis.

— « Ha ! Sinjoro Paŭlo, » ŝi interrompis gaje, nomante lin, por la unua fojo, per lia baptonomo, kio ravigis la junulon, « mi devas danki vin pro via bukedo. Sed mi preskaŭ inklinas ne faronte tion. Kiel ! Ni estas en mezo de Alpoj, kaj vi donacas al mi bukedon de Nicaĵ floroj. Ili estas belegaj, mi konfesas ; kaj se ni estus ankoraŭ en Parizo, mi metus ilin en la honoran lokon ĉe mia salono. Sed ĉi tie, ili kontrastas kun la lando. Via bukedo havas balan robon ; kaj bala robo ne taŭgas en Brigan. Ĉar vi alvenis ĉi tien, unu tagon antaŭ ni, mi imagis ke vi uzos tiun tempon por kolekti tieajn florojn, pensante pri mi, ĉe ĉia deŝirado, kiel bone edukita amanto devas fari. »

Paŭlo Deltur, ĉe tiu iom maldika danko, retrovis sian spiritan liberecon, kaj metinte flanken ĉiujn preparitajn frazojn :

— « Sed, fraŭlino, Septembro ne estas, ĉi tie, la flora sezono. Nune, oni vidas tie ĉi nur kardojn. Vere, ili estas plej diverse kolorigitaj. Tamen, ĉu mi estus kolektinta por vi bukedon de kardoj ? . . . pensante pri vi », li aldonis, kun malica rideto, post mallonga paŭzo.

— « Jes, sinjoro malrespektulo, mi preferas kardojn, ŝiritajn de vi, ol la plej belajn Nicajn florojn. Ĉu vi plendas pri tio ? »

— « Vi estas tute ĉarma, fraŭlino ; kaj tuj, de morgaŭ matene, mi donacos al vi garbon da bluaj ruĝaj blankaj kaj verdaj kardoj. »

— « Tre bone, sinjoro Paŭlo ; sed mi kompatas viajn fingrojn ; kaj ankaŭ la miajn », ŝi aldonis ridetante. « Mi trudos al vi alian taskon eble pli malfacilan. Sed, antaŭe, mi devas diri novaĵon, kiu kredeble malplaĉos al vi. Vi scias ke niaj amikoj gesinjoroj Brizis, havas somerloĝejon en la urbo Ebra ne malproksime de ĉi tie. Ni promesis viziti ilin, dum nia restado en Alpoj ; kaj mi ĵus ricevis leteron de mia amikino Karolino, kiu memorigas min pri nia promeso, kaj insistas ke ni tuj plenumu ĝin. Ŝia patro, eksciinte ke ni estas fianĉigontaj, aldonis leteron al paĉjo, por tre aminde peti nin alkonduki vin. Ni devos iri jam morgaŭ matene, ĉar, ĉe niaj amikoj, nune loĝas aliu konato de paĉjo, kiu prokrastis sian foriron por lin vidi. Oni diras ke la fianĉa tempo estas prova tempo. Do ni, de nun, havas la devon agi malkaŝe, unu kontraŭ la aliu ; kaj vi vidis ke mi donas la ekzemplon. Diru do . . . »

Ŝi haltis kaj ekridis :

— « Ha ! Laŭ via mieno, mi klare vidas ke tiu ĉi vojaĝo ne plenigas vin je entuziasmo. »

La junulo, tre embarasita, hezitis*. Fine :

— « Nu, fraŭlino, ĉar vi postulis ke mi malkaŝe parolu, mi konfesas ke mi sentas teruran timon kontraŭ fraŭlino Karolino. Estas tiel interesa, por fraŭlino, la observado de l'fianĉo de ŝia amikino ! Mi jam antaŭsentas ŝiajn belajn okulojn atentaj al mi, kiel al kurioza besto, kies ĉiuj agoj estas notindaj. Ŝi pensas, sendube, ke mi devos nur paroli distingajojn

(*) *heziti* (L. *hæsitare*) = Sin demandi ĉu oni devas, aŭ ne, fari aŭ diri ion. La verbo *sanceli* pli taŭgas por fizika stato.

aŭ graciaĵojn ; kaj ŝia buŝeto poutos* se mi maltrafos tiun ĉefan devon. Ho ! ; en tiuj kondiĉoj, mi certe farigos vera malspritulo ; kaj kion vi pensos pri mi ? »

— « Mi neniel kredus ke vi estas **timema** », respondis Berto. « Sed tio ne maldecas en vi. Nu, ĉar vi decidis resti ĉi tie dum nia mallonga forestado, mi diros al vi kiamaniere okupi vian tempon. Kiel fianĉa bukedo, mi volas nur unu floron, sed Alpan floron, ekzemple la neĝan stelon, kiun vi mem estos deŝirinta. Mi lokigos ĝin en la kristalan blokon de paperpremilo ; kaj tiel mi konservos, por ĉiam, mian fianĉan floron. Ĉu tia ideo ne plaĉas al vi ? »

— « Certe, fraŭlino, vi trovis la plej bonan rimeдон por dolĉigi la malgajan tempon de via forestado ; kaj la vagonaro, kiu forportos vin, apenaŭ estos ekirinta, kiam mi jam komencos la serĉadon. »

— « Ne tro da fervoro, sinjoro ! Ŝajnus ke vi senpacienus pri mia forveturo. »

— « Fi, fraŭlino ! kiel vi povas esti tiel malbona kontraŭ mi ? »

— « Pardonu min, sinjoro Paŭlo ; estas vera ke mi estas iom pikema. »

Kaj, ĝentile, ŝi etendis manon, kiun li pasie kisis.

Ĝuste, en tiu momento, maturaĝa viro, kun inda eksterajo, eniris la salonon.

— « Nu. Mi vidas ke vi bone uzas la tempon », li diris ironie.

Berto tre ruĝiĝis.

— « Ne, paĉjo ! Vi tute eraras. Sinjoro Deltur kaj mi, faris nenion krom malpaci. Mi riproĉis lin ke li mendis la florojn, kiujn li donacis al mi, anstataŭ deŝiri ilin, li mem ; kaj li, siavice, proponis kolekti por mi bukedon da kardoj. Plie, li rifuzas akompani nin al Ebra. Li pretendas ke li timas Karolinon ; sed mi

(*) *pouti* (A. to pout) = antaŭpuŝi la lipojn, kio montras ke oni ne ŝatas kion oni aŭdas aŭ vidas.

suspektas ke li ĝojas, evitonte, dum kelkaj tagoj, la ŝarĝan fianĉan servadon. »

— « Ne aŭskultu ŝin, sinjoro Meral ! Fraŭlino Berto sin kalumnias ankoraŭ pli ol ŝi kalumnias min. »

— « Bone, bone, » interrompis sinjoro Meral ; « mi pasis la aĝon por interesiĝi je viaj amaj malpacoj. La vetero estas belega. Ni iru promeni antaŭ ol la tagmanĝa horo alvenos. Mia kara Paŭlo, estu nia kondukanto, ĉar vi jaŝm konas iom la landon. »

II.

La sekvantan tagon matene, apenaŭ la vagonaro, kiu forportas sinjoron Meral kaj lian filinon, fariĝis nevidebla, P. Deltur, laŭ sia promeso, ekpensis pri la rimedoj por trovi la floron, kiun li devas akiri. Necesis unue ekscii kie ĝin serĉi. Li memoris ke li vidis, antaŭ du tagoj, unu el tiaj floroj en kunmetaĵo, pli malpli artista, ĉe la butikio de la papervendisto de l'urbeto ; kaj li decidis tuj intervjui la komerciston. La butikio situacias en placeto, kiu estas uzata kiel publika vendejo. Paŭlo rapidis ; sed la papervendisto lin decidis*.

— « Antaŭ kelkaj jaroj, efektive, tielaj floroj kreskis ĉi tie ; sed mi pensas ke neniu restas, ĉar oni plu ne alportas al mi da ili. Mi venigis ĉi tiujn el Svisujo. Ĉu ili ne plaĉas al vi ? »

— « Dankon ; sed mi deziras ilin deŝiri mi mem. »

— « Vi malfacile faros tion », konkludis malvarme la komercisto.

Elirinte, Paŭlo promenis ĉagrenita, inter la du

(*) *decivi iun* = trompi lian esperon. (L. decipere).

vicoj de ordigitaj vilaĝaninoj, kiuj tenis, en korbo, buteron, ovojn, kokidojn aŭ legomojn. Li atente rigardis ilin por diveni ĉu, eble, unu ne estus kapabla doni informon.

Fine li ekvidis, en angulo de la placo, maljunan montanon, kun ruza mieno, sidantan sur kelkaj sakoĵ plenaj je pinaj konusoĵ.

— « Jen estas homo por mi », li pensis ; kaj li tuj alpaŝis.

— « Amiko ! Ĉu vi volas veni kun mi, ĝis tiu butikoj ? Mi intencas demandi vin pri io. »

Ne respondinte, la montano lin sekvis.

— « Vi vidas ĉi tiun floron ? Ĉu ili kreskas en la lando ? »

— « Mi vidis tielajn, tre ofte, dum mia infanaĝo, kiam mi paŝtis brutojn. Sed mi pensas ke ili malaperis, ĉar mi ne renkontas plu da ili. »

— « Kiom domaĝe ! Diru tamen kie vi trovis ilin iam ? »

— « Preskaŭ ĉe la supro de tiu monto, kies kapon vi vidas tie ; ne tre malproksime de vilaĝeto, kiun oni nomas Ursejo. »

— « Ursejo ! Efektive, mi scias ke iam estis ursoj en Alpoj. Sed ili tute malaperis, ĉu ne vere ? »

— « Ho ! » respondis la montano, kun malica rideto, « almenaŭ unu restas ankoraŭ ; kaj eble vi vidos ĝin, se vi promenados tien. »

Paŭlo opiniis ke la vilaĝano lin mokas.

— « Mi tre volonte konantiĝos ĝin, » li rediris, iom tranĉe. « Diru al mi kiom da tempo mi bezonos por iri tien. »

— « Kvar horojn. »

— « Tio ! Oni ne pensus tiel. »

— « Tial ke vi ne scias ankoraŭ taksi la distancojn en la aero. »

— « Ĉu mi povos pasigi la nokton tie supre ? »

— « En ia grenejo, sur fojno ; se vi ne volas

peti la urson pri loĝado. Sed ĝi ne estas ĉiam aminda. »

Paŭlo pensis ke li sufiĉe longe estis celtabulo por la ŝercoj de tiu mokema montano, kaj post malgranda donaco, formarŝis.

— « Tiu maljunulo », li pensis, « forgesis kiel marŝas juna viro, kaj kalkulas la distancojn laŭ sia maljuna paŝo. Mi estas certa ke, dum la jena posttagmezo, mi povos viziti la vilaĝeton, en kiu mi intencas loĝadi, kaj havos tempon por reveni al vespermanĝo. »

Tiam, reirinte la hotelon, li tagmanĝis, kaj, plena je konfido, ekmarŝis.

III.

Por bone ĝui la belecon de lando, estas iaj konvenaj statoj de l'spirito. Komprenoble, fortaj kormovoj malhelpas eksteran atenton. La malfeliĉuloj, premataj de malespero, nenion ŝatas vidinda, kaj la feliĉaj amantoj rigardas nur sin reciproke. Ili povas trairi, kiel blinduloj, la plej belan lokon de l'tero. Sed, kio estas pli surpriza, ankaŭ la personoj, kiuj forlasis ĉian spiritan okupadon, kiuj havas nenion por fari, krom rigardi, ne ĉiam povas bone rigardi; kaj rimarkindaj vidaĵoj faras en ilia cerbo neprofundan impreson, kiun la sekvonta malaperigos. Ŝajnas necesa por ke la impreso estu memora, ke la spirito vigligu la okulojn, por la serĉado de io, kion ĝi kutimas atenti. Tial bone ĝuas pejzaĝon pentristo, admirante kolorajn scenojn, kies fikzadon sur tolaĵo li ofte provis kaj malofte sukcesis, kaj ankaŭ literaturisto, kiu penas esprimi per vortoj la konfuzan senton, aŭ helan aŭ melankolian, kiun la okuloj enverŝas en lian koron. Bone rigardas geologiisto, kiu studas la landan karnon, kaj per la pero de la nunaj cikatroj,

suspektas, en nekalkuleble malantaŭa malproksimo, la terurajn dolorojn de la naskiĝo ; ankaŭ botanikisto, kiu amas ĉiujn partojn de l'pejzaĝo, pro la memoro de ĝojigaj eltrovoj, iam faritaj, aŭ pro la espero de aliaj farotaj.

Paŭlo Deltur fariĝis ja iom botanikisto. Estas vere ke li botanikis nur pri unu floro ; tamen, per ia sorĉaĵo, la lando akiris subite pli interesan aspekton.* Ĉu ĝi ne estis la juvelujo entenanta la serĉatan trezoron ?

Li transiris la valon kaj komencis vigle supreniri la monton, kiun oni montris al li. Baldaŭ la vojo atingis densan arbaron larikan, kies bordon ĝi sekvis.

— « Mi devas iom rapidi », pensis Paŭlo. « Tiu irejo ŝajnas tro longa. Mi supreniru rekte. Plie, la irado estos pli agraba en arbaro. ».

Li eniris la arbaron. Sed la deklivo estis forta. Liaj sennajlaj ledplandoj fariĝis tre glitigaj de frotado sur la grameni** ; kaj, post du horoj da ekzerciĝado, kiun li ne estis kutiminta, li fariĝis tre laca kaj haltis por ripozi.

Tiam li komencis maltrankviliĝi, ekvidinte ke la ĉielo rapide sin kovras per grizaj nuboj. Ĉiuj signoj de civilizo estis malaperintaj, kaj solena silento ĉirkaŭis lin. Nenia pepado de birdoj aŭ zumado de muŝoj estis aŭdebla ; eĉ plej malgranda svingo de branĉeto ĉesis. Li sentis strangan impreson, kvazaŭ ĉi tiuj altaj senmovaj arboj rigardus lin kolere.

— « Eble mi pli bone farus, malsuprenirante », li pensis. « Sed tio estus malkuraĝaĵo. Kredeble, de l'tempo kiam mi marŝas, mi nun proksimas la vilaĝeton, en kiu mi trovos ŝirmejon. Plie, kelkaj gutoj da pluvo ne timigas mi. »

Kaj li daŭrigis la supreniradon.

(*) *aspekto* (L. *aspectus* ; A. F. *aspect* ; G. *anblick* ; I. *aspetto*).

(**) *grameno* (L. *gramen*) = herbaĵo mallonga kaj densa.

La vetero fariĝis pli kaj pli nigra. Subite fulmo ekbrilis ; tondro skuis la arbaron kaj rulis en la montoj ; dikaj gutoj komencis soni sur la folioj. Paŭlo, akcelinte la marŝadon, alvenis al la piedo de granda amaso da rokoj, en kiu li ekvidis, je deko da metroj supre, lokon ŝirmatan kontraŭ la pluvo, de ŝtonego superkuŝanta. Tuj li penis rampi ĝis tie, kaj, post kelkaj provoj, sukcesis la aferon ; sed ne sen iom da difekto por siaj elegantaj vestaĵoj. Tiam, sin preminte en angulon, li aŭskultis rezignacie la frapadon de la pluvo, kiu faladis, kvazaŭ per riveroj, kaj tondrojn, kiujn la montaj eĥoj al si reciproke reĵetis.

Longe li restis en tiu malagrabra situacio. Fine la bruado ĉesis ; kaj, kiam Paŭlo aŭdis la lastajn gutojn kviete sonadi, li intencis malsupreniri de sia piedestalo. Tiam li tre surpriziĝis. La surfaco* de l'roko ŝajnas tute glata, kaj li ne povis kompreni per kia rimedo, li sukcesis atingi la lokon, sur kiu li troviĝis. Li eksciis, al sia domaĝo, ke, sur ŝtonegoj, estas multe pli facila rampi supren ol malsupren. Efektive la malglataĵoj de la surfaco ordinare deklivas al la malsupro ; pro tio, oni ne bone distingas ilin de supre. Tial, en tielaj okazoj, singardema homo ne riskas eĉ unu paŝon, ne bone rimarkinte kiamaniere li povos fari la saman paŝon malantaŭen, se lia suprenrampo estus devige haltigota.

Por pliiĝo de malfeliĉo, la nokto estis alproksimiĝanta rapide, kaj promesis esti senluma, ĉar la ĉielo restis kovrita per nigraj nuboj.

— « Tamen mi ne povas eterne figuri statuon tie ĉi, » diris al si Paŭlo.

Kaj metinte decide la ventron teren, li penis, sin subtenante per la brakoj, kaj frotante la rokon per la piedoj, trovi apogokon. Sed liaj fortoj konsumiĝis en vana serĉo ; kaj subite, li sin sentis tuj falonta. Tiam,

(*) *surfaco* (L. superficies) estas vorto jam tre uzata.

streĉinte ĉiujn muskolojn de l'brakoj, en ekstrema ekpeno, li sukcesis sin tiri denove sur la teraseton, kie li restis kuŝanta sur la brusto, tremanta kaj spireganta.

Kiam lia spirado trankviliĝis, li konsiliĝis kun si mem. Kion do fari ? Li ĵetis longajn alvokojn ; sed la larikoj ŝajnis sin unuigi ronde, por sufoki la bruon.

— « Nu, » li konkludis malĝoje, « necesos pasigi la nokton en tiu neagrable situacio. Estos ankoraŭ feliĉo, se la pluvo ne revenos. Mi estu pacienca, kaj dormu, se eble. »

Sed tio ne estis ebla. Tremetanta de la malvarmo alportita de la pluvo, kaj malvole impresita de la nokto, kaj de la plialtiĝo de la larikoj tute nigraj, li, iam post iam, fariĝis nervema. Li provis ankoraŭ kriadon ; sed lia voĉo tiel lugubre* sonadis, ke li, timigita, tuj ĉesis.

Tiam eniris en lian cerbon la rememoro pri tiu montano, kiu matene parolis kun li. Ĉu vere estas ankoraŭ unu urso, en tiu malhela arbaro ? Nune, tio ne estis plu neverŝajna ; kaj nevole li atentigis la orelojn, iom skuita de l'subita brueto, ĉe la falo de iu akva guto, malfruiĝinta sur branĉo.

En tiu momento, li aŭdis strangan grincon, kvazaŭ graton de ungegoj kontraŭ ŝtono. Kliniĝinte super la rando de la ŝtonego, li sin rejetis malantaŭen, duone svenantan pro teruro. Li estis vidinta grandan nigran beston, kiu rampas al li.

Post kelkaj sekundoj, kapo elŝoviĝis ĉe la nivelo de l'teraseto, kaj homa voĉo kriis :

— « Kion vi faras tie ? »

Paŭlo estis nekapabla respondi.

-- « Vi ne povas plu malsupreniri ; ĉu ne vere ? Venu ! »

(*) Io *lugubra* estas io kiu faras tre malĝojigan impreson. (L. lugubris).

— —

Mano ektiris unu kruron de Paŭlo, kiu, penante ordigi sian spiriton, obee sekvis la direkton donitan, kaj, sen ia hezitado, sin konfidis al la manoj, kiuj metis liajn piedojn en ĝustajn lokojn.

Unu minuton poste, li kuris, per la tuta forto de siaj rigidiĝintaj kruroj, post sia kondukanto, kiu, ne elparolinte unu vorton, marŝis, per grandaj paŝoj, kvazaŭ li promenus, tage, en horizontala irejo. La pluvo rekomencis ; sed neniu el ili faris ian rimarkon pri tio.

Tempo pasis, kiu ŝajnis longa al Paŭlo. Tiam la nekonato, montrante vojeton, kiun la blankaj ŝtonetoj, amasiĝintaj en ĝi, vidigis en sufiĉa maniero :

— « Jen via vojo. Penu ne perdi ĝin, kaj ĉiam tenu vin je la dekstra flanko. Sed iru plej rapide, por ke la malsano ne kaptu vin. »

Kaj li tuj rekomencis la marŝadon reen.

— « Kiu vi estas? » kriis Paŭlo al la ombro jam malaperanta.

De malproksime, respondo venis.

— « Oni min nomas la urso ! »

IV.

Post unu horo, Paŭlo Deltur, vestita per sekaj vestoj, sidis komforte, apud fajro, antaŭ tablo, en la manĝoĉambro de la hotelo, kaj manĝis varman supon kun granda apetito. Li estis sola manĝanto, ĉar la kuintima horo de la vespermanĝo jam de longe pasis. La hotelmastro mem, tre kompleze, servis lin, kaj samtempe babiladis.

— « Certe, sinjoro, mi sentis min hodiaŭ vespere, tre maltrankvila pri vi, kiam mi vidis, ke malgraŭ tiu

abomena vetero, vi ne revenas. Eĉ, mi diris al mia edzino : estas kredebla ke tiu malfeliĉa junulo rompis al si unu kruron, aŭ eĉ la kapon. Morgaŭ, ni devos nin okupi pri lia serĉado, kaj eble zorgi pri lia enterigo, kiel por tiu aliu vojaĝanto, antaŭ du jaroj ; ci memoras ? -- Jes, sinjoro, ni estus farintaj tiele. Sed mi tre ĝojas ke vi revenis sen malfeliĉaĵo. »

— « Dankon, kara sinjoro », rediris Paŭlo amuzita, « pro viaj bonaj intencoj pri mia enterigo. Sed, diru ; ĉu vi ne konas vilaĝeton Ursejon kaj viron, kiun oni nomas la urso ? »

— « Tute ne, sinjoro. Mi ne naskigis en tiu ĉi lando ; kaj mi ne estas tiel malsaĝa por riski la haŭton en la montoj. Se vi permesas ke mi donu konsilon, estu pli singardema kaj prenu gvidiston. Mi povas venigi unu al vi. »

— « Ne. Mi ne deziras min levi al glaciejoj. Mi nur volas iri en la vilaĝeton Ursejon por pasigi la nokton. Sekve, vi ne bezonos maltrankviliĝi pro mia forestado, morgaŭ vespere. La vilaĝeto, kiel oni diris al mi, estas nune loĝata. Do, mi trovos tie lakton kaj terpomojn. Pretigu tamen ian provizajon helpantan. Mi intencas ekiri tuj post la tagmanĝo. »

V.

La sekvantan matenon, Paŭlo aĉetis, en la urbeto, Alpan bastonon kun fera pinto, ĉasveston, kaj paron da ŝuoj, kun ledplandoj tute kovritaj de dikaj najloj. Tiam li sin opiniis vera montano ; kaj, post la tagmanĝo, li ekmarŝis, fiero, kiel kavaliro vestinta kirason kaj pugnotenanta lancon. Vane la suno, bri-

lanta en blua ĉielo, lin trapikis per siaj oraj sagoj; li ne malrapidigis la marŝadon.

Tamen, alveninte al la bordo de l'arbaro, li decidis saĝe daŭrigi la sekvadon de la vojo, kiu direktis al unu el tiuj mallarĝaj krutaj valetoj, kiujn la tieaj montanoj nomas *kumb*. Ĉi tiu *kumb*, tre profunde tranĉita, kuŝis inter du najbaraj montoj. Enirinte en ĝin, oni havas sovaĝan vidaĵon. La deklivoj de la du flankoj estas tute kovritaj de ŝtonoj kaj ŝtonegoj, amasigitaj de la vintraj lavangoj, kiuj ruligis ilin kune kun la neĝo. La tero malaperas sub tiu peza mantelo, kaj nenia herbo vidiĝas, eĉ sur la bordoj de l'torento, kiu ŝaŭmas en la fundo. Tamen pinoj, kun ruĝaj trunkoj, kreskas ĉi tie kaj tie, kaj iliaj malhelaj foliaroj aperas kiel makuloj sur labedo de l'ŝtonoj blankaj aŭ helflavaj.

La vojo serpentiras laŭ la kurboj de l'monto. Ĉe turno, Paŭlo renkontis du junajn montanojn malsuprenirantajn. Estis ŝanco.

— « Diru, amikoj ; ĉu efektive ĉi tiu vojo kondukas al Ursejo ? »

— « Jes ; sekvu la vojon, ĝis kiam vi vidos ponteton sur la torento. Tiam prenu vojeton kiu surprizas dekstren. »

— « Dankon ; sed ĉu vi konas viron kiun oni nomas la Urso ? »

La adresato lin rigardis suspekta.

— « Kompreneble, oni konas lin. »

— « Kiu li estas ? »

— « La arbara gardisto de la kumunumo. »

— « Kia estas lia vera nomo ? »

— « Johano Lero. »

— « Sed kial oni donis al li tian surnomon ? »

Tiun ĉi fojon, la junulo ŝajnis trovi la demandon ne diskreta, kaj ne respondante, levis la ŝultrojn. Sed la aliu junulo, kies okuloj kolere brilis, ekkriis :

— « Tial ke li ne pli valoras ol malbona besto ! »

La unua maltrankviliĝis.

— « Ne aŭskultu lin, sinjoro ; li koleras pro tio, ke la urso batis lin iun tagon, kiam li surprizis lin dehakinta arbon, sen permeso. »

Tiam, sin turninte al sia kunulo :

— « Sed, mi demandas cin : ĉu ne estas pli bone ricevi kelkajn batojn, ol iri en malliberejon, kiel faris Olanie, pro la gardisto de Sankta-Albano. Ĉu ci ankoraŭ ne scias gardi la langon varma*? Sed, Sinjoro, » li daŭrigis adresante sin al Paŭlo, « kion vi havas kun Johano Lero ? »

— « Nenion gravan. Mi intencas pasigi la nokton en la vilaĝeto, por promeni morgaŭ ĉe la supro de l'monto ; kaj oni diris al mi ke li povos akcepti min. Ĉu vi opinias ke li konsentos ? »

— « Eble, » respondis, kun duba mieno, la junulo, kiu, opiniante almenaŭ senutila pluan interparoladon, interrompis :

— « Nu, sinjoro, iru malrapide. »

Tio estas la ordinara adiaŭo de montano, kiu renkontas aliun suprenirantan. Ambaŭ rekomencis la mal-supreniron per grandaj paŝoj, kaj baldaŭ malaperis.

Paŭlo sekvis la prudentan konsilon ĵus donitan, tiom pli volonte ke li komencis suferi pro la varmo kaj la soifo. Alloganta torento muzikis en la profundo ; sed la alpaŝado al ĝi vidiĝas tute ne agrabla, kaj la reen irado pli malagrabla ankoraŭ, sur tiuj rompitaĵoj ŝtonegoj ; kaj Paŭlo rezignacie decidis soifi ĝis la promesita ponteto.

La interspaco inter la vojo kaj la torento malgrandiĝis ĉe ĉiu turno. Fine li ekvidis la deziratan ponton, kaj iom antaŭe, veran oazeton, borditan de dikaj ŝtonoj, kiel de ramparo. Li ĝoje alrapidis.

La loko estis efektive loganta ; kaj ĝia ĉarmo pligrandiĝis pro la kontrasto al la sekaj najbaraj de-

(*) Popola dirmaniero kiu signifas *silenti*.

klivoj. La torento, mallarĝigita de du ŝtonegoj, falis brue en pelvon, kies ĉirkaŭaĵo ebeniĝis de l'argilo alportita en ia epoko de grava defluo. Dank' al la akva polvo elfluganta el la malgranda akvofalo, la tero estis kovrita de senintermanka tapiŝo de freŝa musko brila kiel verda silkaĵo. Dissemita sur ĝi, vidiĝis aro da blankaj steletoj kvinpintaj, kuŝantaj sur la fino de maldika trunketo, kiu elsaltas, kvazaŭ ŝtala fadeno, el la bazaj folioj. Oni nomas *parnasio** tiun elegantan floreteton, kies petaloj, kun siaj diafanaj vejnoj, ŝajnas esti ia karno, ideale pura.

Kia plezuro por soifanto, sin sterni sur punte ornamita mantelo, kaj enŝovi la buŝon en la freŝan akvon ! Post la malapero de la soifo, la laciĝo fariĝis pli sentebla. Paŭlo restis senmova, lasante la bruon de l'akvofalo, sonantan en liaj oreloj, konfuzi lian cerbon. Baldaŭ li vidis sur blanka ŝtono, kiu, kiel insuleto, elstaris en miniatura lago, nigran skarabon, kiu kredeble, post falo dum iu nesingardema promenado, estis alportita tien de la fluo. Aŭskulti monotonan ruladon de torento, kaj atenti la senlacan marŝadon de insekto en malliberejo, estas tre ripoza okupado, kiun Paŭlo plene ĝuis. Fine, li sentis ian emon al movo ree vekigi. Etendinte la brakon, li prenis sian bastonon, kaj metis ĝin, kiel ponton, inter la bordo kaj la blanka ŝtono. La skarabo kviete marŝis sur ĝi, kaj malaperis en la muskon.

— « Ĉi tiu insekto, » rimarkis Paŭlo, « sin savis per la sama paŝo, per kiu li promenadis antaŭ la dro-nado. Se iu homo tiel agus, kia heroo li estus ! »

Tiu filozofa penso tre plaĉis al li, kaj lin vigligis. Li saltis sur siaj piedoj, kaj sekvis, per decidaj paŝoj, vojeton, kiu disiĝante de la ĝis nun sekvita direkto, suprenrampis zigzage la deklivon kaj baldaŭ eniris la arbaron.

(*) *Parnassia palustris*.

VI.

Nune la arbaro, tute penetrita de la sunaj radioj, kiuj libere ludis en la malpeza foliaro de larikoj, faris tute alian impreson ol en la antaŭa tago. Tamen Paŭlo rigardis malkonfide al la larikoj, kvazaŭ li suspektus ilin ruzi por lin altiri al lia perdo. Vane, la gramena tapiŝo prezentis lokojn supersutitajn de malgrandaj fragoj ; vane, la arboj, iafoje ordigitaj de la naturo, ĉe ĉiu flanko de ia tera faldo, vidigas kvazaŭ aleon loĝantan al promenado ; li ne volis riski unu paŝon ekster la vojo, kiun li sekvis.

Fine, la arbaro finiĝis ; kaj li alvenis al granda rondaĵo, senigita je arboj, kie la tero estis multe malpli dekliva ol en la arbaro ĉirkaŭa. Meze de la herbejo, dolĉe ondanta, vidiĝas kelkaj dometoj, kun tabulaj tegmentoj, grizaj de la suna agado. Tiuj dometoj, duone enigitaj en la deklivon, ĉe la posta parto, aspektas kiel sovaĝaj bestoj, kunpremitaj al tero, kvazaŭ ili intencus esti malpli videblaj. Teretaĝe estas stalo, en kiu nur granda pordo, malfermita dum la tago, allasas aeron kaj lumon. La unua etaĝo estas loĝata de la montanoj. La pordo, lokita flanke, estas atingebla aŭ rekte de la deklivo, aŭ per la pero de klinanta ligna planko. Unu aŭ du malgrandaj fenestroj vidiĝas en la sama muro. Sub la tegmento estas fojnujo, kies pordo ekzistas en la posta flanko, tiel ke oni povas eniri ankaŭ rekte, aŭ per mallonga gradaro. Tiamaniere, la montanoj ne bezonas ŝtuparojn.

La vilaĝeto ŝajnis malplena je homaj estaĵoj. Nur kokinoj, kiuj fervore gratis la sterkon amasigitan apud domoj, aperis kiel la nunaj loĝantoj. Cetere ĉiuj pordoj estis malfermitaj, kaj Paŭlo uzis la permeson eniri unu el tiuj mizeraj loĝejoj.

La ĉambro estas tiel malalta, ke oni facile tuŝas, per la mano, la trabojn kaj tabulojn de l'plafono. En angulo, sur larĝa plata ŝtono, kelkaj branĉoj ankoraŭ brulas, kaj la fumo forflugas pli malpli, en morta tubo, tra la plafono ; malpli prefere ol pli ; ĉar estas certe la fumo, kiu tiel nigrigis ĉiujn objektojn en la ĉambro, precipe apud la fajrejo, la ŝrankon, sur kiu kuŝas fajencaj *ekueloj**. Nur kupra sitelo brilas sur tiu malbrila fundo. Laŭ la muro, sub la fenestroj, dika larika trunko aspektas kiel benko ; sed ĝi estas provizita de tabula pordo, kaj malferminte ĝin, oni ekvidas aron da sekalaj panoj. Ĉe la muro kontraŭa al la pordo kaj al la fenestroj, ordas kelkaj grandaj kestoj, starigitaj sur piedoj, kaj entenantaj pajlon. Tegoj, jetitaj sur tiu pajlo, komprenigas ke tiuj kestoj estas la litoj, en kiuj la montanoj, sufiĉe ŝirmataj de l'aerfluo, kiuj blovas tra la fendoj de l'planko, dormas pli bonan dormadon, ol la urbanoj, en siaj dolĉaj kurtenitaj litoj.

— « Al la diablo ! » pensis Paŭlo, la loĝejo ne aspektas tre komforta. Ne estas tre allogante pasigi la nokton en tia hundodometo, kune kun la puloj ; kaj en la fojnujo, eble mi frostiĝos. Mi eksperimentis ke ĉi tie la nokto estas tro freŝiga. Despli malbone ! Malagrabla nokto ne ĉiam daŭras. Nun mi devas trovi iun, kun kiu mi povos paroli. »

Elirinte, li trairis la vilaĝeton.

— « Fine jen estas iu, aŭ almenaŭ la kvarono de iu, » li diris al si mem.

Antaŭ li estis la fontano de l'vilaĝo. Pura rivereto, fluanta per ligna kondukilo, falas inter ŝtonoj aranĝitaj por ricevi sitelojn, kaj poste plenigas pelvon borditan de plataj ŝtonoj, videble uzitaj de la dommastrinoj por la lavado. Knabeto ĉirkaŭ sesjara, vestita per kruda jako, kun tro mallonga pantalone, kaj

(*) *speco da grandaj tasoj kun du oreloj por ilin preni.*

tro grandaj ŝuoj, kuŝas je la ventro, sur unu el tiuj ŝtonoj. Lia atento estas tute okupita de malgranda boateto, kiun li penas, per vergeto, alvenigi kontraŭ la fluo, en haveneton inter du ŝtonoj.

Kelkajn momentojn, Paŭlo senmova rigardis la senĉapelan rondan figureton, kiun la alternaj frostpikoj kaj sunbruloj kolorigis kiel kuirita argilaĵo. Li ridetis pro la grandaj nigraj okuloj, atente streĉitaj, kaj pro la rondaj mallertaj gestoj, per kiuj la infano invitadis la rifuzantan boaton.

Sed kiu do tiel lerte skulptis en pina ŝelo tiun boateton ? Paŭlo almarŝis. La infano, ekvidinte lin, tuj ekkaptis la ŝipeton kaj staris senmova, duone miranta, duone timanta, antaŭ tiu bela sinjoro. Paŭlo laŭdis la boaton ; sed ĉi tio ŝajnis suspektinda al la knabeto, kiu premis sian trezoron sur la bruston. Tamen, per peco da ĉokolado, elprenita el sia saketo, Paŭlo sukcesis akiri iom da konfido.

— « Kiu donis al ci tian belan ŝipeton, amiketo mia ? »

— « La urso » respondis mallonge la etulo.

— « Vere ! Mi volas ĝuste paroli kun li. Kie li loĝas ? »

La infano montris, per la pugno, la plej altan parton de l'senarba rondo, en kiu la vilaĝeto kuŝas. Sed neniam domo tie vidiĝis.

— « Ĉu estas malproksime ? » demandis Paŭlo.

La knabeto neis per la kapo.

— « Ĉu ci volas konduki min ? Mi donos al ci alian peceton da ĉokolado. »

Neion respondinte, la infano ekmarŝis, surprizante la deklivan herbaĵon, kaj movante siajn piedetojn, kun tia rapideco, ke Paŭlo, laca, preskaŭ ne povis lin sekvi.

VII.

Alproksimiĝinte la bordon de la arbaro, Paŭlo komprenis kial la serĉata domo ne povas esti vidata antaŭ ol oni estos kontraŭ ĝi. Supre de la deklivo, tie tre klinanta, estas duonronda teraso, natura aŭ artefarita, kies radio havas proksimume dudekon da metroj ; kaj tuj malantaŭe, la deklivo rekomencas, tie kovrita de altaj larikoj.

En la dekstra angulo, malgranda rivereto, elirante el la arbaro, falas, per ligna tubo, en pelvon kavigitan en peco de dika larika trunko, kaj formas gajigan fontanon.

Ĉe la fundo de la teraso, apud la arboj, kuŝas longa kaj malalta domo, direktita de l'oriento al la okcidento. Maldekstre, ĝia posta parto eniĝas en la deklivon ; sed tiun ĉi fojon, la tero, abrupte tranĉita, ne tuŝas la murojn, kaj irejo, larĝa proksimume unu metron, ĉirkaŭas la poston.

Alveninte al la meza bordo de l'teraso, oni havas antaŭ si, la sudan muron, boritan per du kvadrataj fenestroj, kun malgrandaj vitraĵeroj. Sur la dekstra flanko, estas ligna pordo, super kiu la tegmento, preteriranta la murojn, kaj apogita sur du vertikalaj traboj, tri paŝojn de la pordo, formas tektejon*, kiu donas al la konstruaĵo aspekton pli gravan ol tiu de la domoj, kiujn Paŭlo ĵus vizitis.

Inter la malantaŭa trabo kaj la domo, pario** formita de tabuloj, ĉe la nivelo de la norda muro, prezentas angulon, ŝirmatan kontraŭ la pluvo, kaj elmetitan al la radioj de l'subiranta suno. Tie du benkoj,

(*) *tektejo* (L. tectum) = loko ŝirmata de tegmento sen flankaj muroj.

(**) *pario* (L. paries) estas vorto jam tre uzata.

estas lokitaj, unu kontraŭ la muro, la aliu kontraŭ la pario. Fine, du vitraĵoj, kuŝantaj sur la tegmento, montras ke la grenejo ne servas por enteni fojnon.

Dum Paŭlo kurioze ekzamenis la domon, kaj malrapide alpaŝis, la knabo kuris al la pordo kaj ekkriis :

— « Urso ! Jen estas ia sinjoro. »

Tiam aperis sur la sojlo granda kaj malgrasa viro kun haroj kaj barbo tute blankaj, kiuj enkadris kontraste lian brunan vizaĝon. Li estis vestita, kiel iu ajn malriĉa montano, per malglataj vestaĵoj. Nur lia kepo, el verda drapo, kun ĉaskorno brodita, kaj ŝuoj, videble faritaj de lerta ŝuisto, montris lian profesion okupadon. Li ŝajnis tre maljuna ; sed Paŭlo, kiu spertis ke li estas ankoraŭ vigla, juĝis, laŭ la firma tenado, kaj la brilaj okuloj, ke la unua aspekto estis trompa.

La viro staris senmova, rigardante la alvenanton en neamika maniero. Paŭlo gaje salutis.

— « Ĉu vi rekonas min, mia bona ? »

— « Jes, » respondis la urso moke ; « vi estas la birdo, kiun mi elnestigis hieraŭ. »

Surprizita de tiel malafabla akcepto, Paŭlo ekkoleris interne ; sed sin per forto kvietigante, li malvarme rediris :

— « Mi supreniris por danki vin. »

Kaj vere, en tiu momento, li opiniis ke li estas sincera. Ĉe tiuj vortoj, la gardisto ŝajnis honti sian malgentilecon, kaj kun tute ŝanĝita tono :

— « Ho ! Tio ne valoras la penon. Sed sidiĝu, sinjoro. Vi estas laca sendube, kaj soifanta. Bedaŭrinde mi ne havas vinon ; sed mi tuj preparos al vi sukerigitan akvon kun brando. »

Li rapidis internen. Paŭlo, efektive tre laca, sin faligis sur benkon ; kaj, etendinte la krurojn, rigardis malproksimen la fierajn montkapojn vestitajn de neĝo, kaj brilantajn de la lastaj radioj de l'suno.

Tiam la knabeto sin metis antaŭ lin, kaj rigardis per tiel parolantaj okuloj, ke Paŭlo ridis.

— « Ha ! Ci prave postulas la promesitan rekompencon. »

Li eltiris pecon da ĉokolado, kiun la infano prenis kaj manĝis, ne ĉesante tre atenti la sinjoron.

Tiam la urso alportis malgrandan tablon kun du glasoj, feran sukerujon, kaj botelon da brando. Poste li ĉerpis kruĉeton da akvo el la fontano. Tiam sidiĝinte, li rimarkis la infanon.

— « Kion ci faras ĉi tie, Andreo ? »

— « Li min kondukis, » interrompis Paŭlo, « kaj montris la beletan ŝipeton, kiun vi donacis al li. Mi miras kiel ĝuste vi skulptis ĝin. »

Ĉiu homo estas kontenta de laŭdo al sia faraĵo ; kaj la urso preskaŭ ridetis.

— « Mi vidis iam maron kaj ŝipojn. »

Sed li sin interrompis subite.

— « Andreo ! La suno malaperas ; baldaŭ la patrino revenos hejmen ; kaj ŝi riproĉos cian forestadon. Ci devas malsupreniri, fileto. »

Andreo jesis per la kapo, tuj foriĝis kaj baldaŭ malaperis post la deklivon.

— « Li ne estas babilemulo, » rimarkigis Paŭlo.

— « Pro manko de kutimo. Sed hodiaŭ vespere, li havos por rakonti pri vi al sia patrino. »

Li preparis la trinkaĵojn ; kaj, frapinte per sia glaso kontraŭ la aliu :

— « Bonan farton, sinjoro ! »

Poste, kun videbla hezitado :

— « Vi povos reveni en vian hotelon, nur tre malfrue en la nokto ; ĉu vi ne volas iom manĝi antaŭ ol malsupreniri ? »

Paŭlo sentis ke li devas klarigi sian projekton.

— « Mi intencas pasigi la nokton en tiu vilaĝeto. Mi devas serĉi, dum la morgaŭa tago, floron, kiu, kiel oni diris al mi, kreskas ie en la ĉirkaŭaĵo. Oni nomas ĝin la neĝa stelo. Eble vi ĝin konas, kaj povos helpi al mi. »

La vizaĝo de la urso denove malheliĝis.

— « Ho ! Tiuj, kiuj informis vin, ne scias kion ili parolas. Efektive tiaj floroj kreskis ĉi tie, antaŭ kelkaj jaroj ; sed sentaŭguloj venis, kiuj elterigis ilin, ĝis la lasta, por vendado ; kaj nun ne restas eĉ unu. Tiam, vi malpravos pasigante malagrablan kaj malvarman nokton, en iu grenejo, por vana serĉado. »

Paŭlo ĉagreniĝis. Tamen, li daŭrigis :

— « Eble kelkaj supervivas ne trovitaj. Mi bezonas nur unu. Mi pagus altan prezon por ĝi, » li aldonis en signifa maniero.

— « Ho ! vi povos pagi al iu montano, por promeni kun vi, dum tuta tago : sed vi duope ne povos trovi tion, kio ne ekzistas. »

Sed la tro tranĉa tono sciigis al Paŭlo, unue ke lia kontraŭdiranto mensogis, due ke li estas kredeble la sola persono, kiu povus utili al li. Li rediris, post momenta silento.

— « Tamen mi tre dezirus havi unu el tiuj floroj ; nur unu, » li insistis.

— « Vi povas aĉeti ilin. Mi vidis kelkajn post la vitraĵo de pāpervendejo en la urbo, antaŭ nelonge. »

Paŭlo silentis. Li hontis paroli pri Berĉo kun vilaĝano. Tamen, ne trovinte alian rimedon, li decidiĝis. Kaj instinkte, li adresis sin al sia kunulo en pli ceremonia maniero.

— « Sinjoro Lero, mi baldaŭ edziĝos ; kaj mia fianĉino petis ke mi donacu al ŝi tian floron. Ŝi kredas ke se mi mem elterigos ĝin, tio alportos feliĉecon sur nian edziĝon. »

Sur la movemaj trajtoj de l'montano aperis pli dolĉa esprimo.

— « Kial do tia ideo ? »

Paŭlo ekkuris sur la vojo malfermita kaj flame ekparolis :

— « Ĉar ŝi tre admiras viajn belajn montojn. Plie, ni fianĉiĝis en tiu valo. Ĉu ni ne devas, pro tio, eterne

ami ĝin ? Ĉu ne estus feliĉa antaŭsigno se la unua ligilo inter ni, estus la floro, kiun karesis la plej pura spiro de l'monto ? »

Li haltis, suspektinte gliton de moka rideto sur la lipoj de sia kunulo.

— « Mi malsaĝas, » li pensis, « ke mi tiele parolas al vilaĝano. Li devas pensi ke mi freneziĝis. »

Iom malkviete, li rigardis al Lero ; sed ĉi tiu silentis, revema. Fine :

— « Sinjoro, vi elprenos nur unu ? »

— « Mi juras ! »

— « Bone. Morgaŭ matene mi kondukos vin. »

— « Ho dankon ! sinjoro Lero. Petu de mi kion vi volas. »

— « Mi bezonas nenion, » respondis iom krude la urso ; « sed ĉar al vi estus tre malbone en la malsupraj domoj, restu ĉi tie ; almenaŭ vi havos liton. »

— « Tre volonte kaj danke, mia amiko. Ni manĝos kune kelkajn provizaĵojn, kiujn mi kunportis. »

— « Nu do, estas tempo por prepari la manĝadon. »

Lero sin levis ; kaj Paŭlo lin sekvis en la domon.

VIII.

Enirante, oni sin trovas en kvadrata ĉambro je kvin metroj, kun malalta ligna plafono, kies aspekto estas pura kaj komforta. Ĝin lumigas po unu fenestro ĉe la du flankoj. Per la fenestro al la teraso aperas ĉielo kaj aro da malproksimaj kulmenoj*, intermiksitaj kun neĝaj bedoj. Per la aliu, al la arbaro, oni vidas

* *Kulmeno* (L. culmen) = Supra parto de monto.

nur deklivan gramenan tapiŝon, striatan de la grizaj trunkoj de larikoj. La pario kontraŭa al la pordo, estas formita, ĝis la plafono, per lignaj ŝrankoj. Meze, du-plata pordo, nune fermita, permesas aliron al dua ĉambro. En la angulo dekstre de iu, kiu enirus la domon, estas kameno, bone konstruita, kun larĝa plata ŝtono, kaj fera lado en la muro. En tiu angulo kelkaj kaseroloj, kaj diversaj kuirejaj iloj estas alkroĉitaj al la muro, aŭ kuŝas sur la bordo de l'kamena mantelo. Apude, sur benketo, du kupraj siteloj brilas, bone frotitaj. La meblaro konsistas el granda tablo, du benkoj, kaj kvar seĝoj, el la sama larika ligno, iom brunigita de la fumo, kiel la plafono, la planko, kaj la ŝrankoj.

Paŭlo juĝis ke la mastro de tia domo, povas esti kalkulata inter la plej riĉaj el la tieaj montanoj.

-- « Kiom bela kaj komforta aspektas via domo, Sinjoro Lero ! » li ekkriis.

La adresato ŝajnis flatita.

— « Jes, » li respondis. « Ĝi estas sufiĉe bona truo por urso. Sed mi devas zorgi pri mia nesto, ĉar en nia lando, la vintro daŭras, kaj ofte ĝi estas terura. »

— « Ĉu vere, vi pasigas la vintron, tute sola, en tia altaĵo ? »

— « Jes. Mi estas kutiminta al tio. Cetere mi estas bone defendata kontraŭ la frostoj. Rimarku kiel dikaj estas la muroj ; ili konservas la internan varmon. La pordo kaj la fenestraj kadroj estas ĉe la ekstera nivelo, sed kiam la malbona sezono alproksimiĝas, mi starigas aliujn pordon kaj kadrojn, kies hokojn vi vidas ĉe la nivelo interna ; kaj tiel, la malvarmo estas haltigata en la interspaco. Plie, mia dormoĉambro estas ankoraŭ pli bone ŝirmata, ĉar la neĝo amasiĝas de la vento en la irejo post la domo, kaj plenigas ĝin ĝis super la tegmento. Sub tia dika mantelo, la plej forta ventego neniel povas influi. »

Tiam la urso, pensinte ke li sufiĉe parolis, dis-

blovis la fajron, metis sur ĝin kaldronon por prepari la supon, kaj enprofundiĝis en la elŝeladon de terpoj. Sed, interesita, Paŭlo penis daŭrigi la babiladon, kaj montrinte la fermitan pordon :

— « Jen estas via dormoĉambro, ĉu ne ? »

— « Jes. »

Tiu « jes » estis preskaŭ kolera. Paŭlo ŝanĝis la temon.

— « Jen estas mia kunhelpaĵo al la manĝo. »

Kaj li eltiris pasteĉon el sia sako kaj metis ĝin sur la tablon. La urso apenaŭ levis la kapon.

— « Ĝiamaniere vi estas provizita dum la vintro, ĉar mi pensas ke la malsupreniro al la valo ne estas facila tiam. »

— « Eĉ nebla, tre ofte. Sed, en aŭtuno, mi amasigas provizojn ĉiuspecajn en mia grenejo. »

— « Sed pri pano ? »

— « La panisto de l'vilaĝo, en la valo, bakas okdek sekalajn panojn por mi, ĉe la fino de oktobro. »

— « Ĉu efektive, pano povas konserviĝi kelkajn monatojn ? »

— « Eĉ kelkajn jarojn. »

— « Sed ; ĝi devas esti terure malmola. »

— « Mi havas bonan tranĉilon. »

Kaj li montris, per la mano, hakilon alkroĉitan al la muro. Senkuraĝigita, Paŭlo silentis. Tamen, post kelke da tempo, kiam Lero finis ĵetinte siajn terpomojn en la kaldronon, li propramove rompis la silentadon.

— « Ĉu vi volas vidi mian magazenon kaj vian ĉambron ? »

— « Kun plezuro. »

La urso marŝis al la angulo kontraŭkamena. Li tiris ŝnuron, kaj plankpordo leviĝis en la plafono.

— « Jen estas la pordo. »

Poste, li iris al gradaro kun larĝaj baroj, kiu estas almetita kontraŭ la muro, en klina situacio, kaj, forpuŝinte kroĉilon, turnis ĝin en normalan staton.

— « Jen estas la ŝtuparo ; ni supreniru. »

Alveninte supren, Paŭlo vidis longan ĉambro kun mortera planko, kiu etendiĝis en la tuta domo, bone lumigata de la du fenestroj en la tegmento. En angulo, du ĉambretoj ; meze, fera forno apogita kontraŭ masonita kamentubo, kiu staras kiel kolono. Sub unu el la fenestroj kuŝas benko de lignajisto, en amaso da rabotaĵo ; kaj diversaj iloj pendas de la traboj, ĉe ĉiu flanko. Sub la aliu fenestro, stablo kun ŝraŭbtenilo, kaj apude amboso kaj kelkaj kestetoj, plenaj je feraj aŭ kupraj pecoj. Ĉe la fundo, lignaj tabuloj starigitaj. La flanko de l'ĉambro estas okupata, laŭ la tuta longo, ĝis la ĉambretoj, per amaso da ŝtipoj, bone ordigitaj.

— « Vi vidas, » diris Lero ; « mi jam kolektis mian provizon da ligno por la venonta vintro. »

— « Jes ; vi havas por longedaŭra fajro. Sed ĉu vi estas ankaŭ lignajisto kaj seruristo ? »

— « Ne ; sed, devigite, mi lernis raboti tabulon, aŭ fajli pecon da fero. Mi ne povas venigi profesion laboriston por bagateloj. Alial, kiamaniere mi pasigus la tempon de mia mallibereco, se mi ne iom laborus interne ? »

Li malfermis la pordon de la unua ĉambreto, ĉe la angulo.

— « Jen estas la ĉambro de mia filo, kiam li vizitas min. Ifoje ankaŭ, mi loĝigas en ĝi mian estron, la inspektoron de arbaroj, kiam li havas longan laboron por fari en la monto. Ĝi estos via, ĉi tiun nokton. »

La montrita ĉambreto, lumigata de malgranda vitro en la tegmento, estis tre malvasta. En ĝi nur fera lito, tablo, du lignaj seĝoj, kaj ŝranko. Speguleto pendis sur la muro.

El la ŝranko, Lero eltiris littukojn kaj grizajn teĝojn, kaj rapidis preparante la liton.

— « Kie estas via filo ? » demandis Paŭlo.

La urso rigardis al li, kvazaŭ li trovus la demandon nediskreta, kaj respondis tranĉe :

— « Li ankaŭ estas arbaristo. »

Paŭlo, iom ĝenita, rapidis al alia demando.

— « Kaj la aliu ĉambreto ? »

— « Ĝi estas mia provizejo, » diris Lero, malferminte la pordon.

En la ĉambreto, kelkaj sakoj; granda ŝranko, kiu, malfermita, liveris vidaĵon de spicvendejo; en angulo, kolono da brunaj sekalaj panoj.

— « Tie estas mia frostejo », diris la urso, montrante truojn en la muro, fermitajn de fera tolaĵo. Ĉi tie la frosto estas la mastro dum la vintro; kaj mi konservas longatempe freŝan buteron kaj viandon tute frostigitajn. Nur la sakojn da terpomoj mi translokigas en la unuan ĉambreton, kiu estas iom varmigata de la tubo de la malsupra kameno, ĉar la frosto ne estas pli bona afero por la terpomoj ol por la homoj. Sed estas tempo por zorgi pri la vespermanĝo; ni malsupreniru. »

Paŭlo estis tre deziranta vidi la dormoĉambron de Lero; sed li timis ke li malplaĉos al la kruda arbara gardisto, kaj altiros al si malĝentilan respondon. Tial li decidis atendi ĝis Lero, propramove, malfermos la pordon.

Post kelkaj momentoj, dum li estis admiranta, tra la suda fenestro, la ruĝajn nubojn, flamantajn super la fundo jam malhela de l'valo, li ekaŭdis la grincon de tiu pordo. Li sin turnis; sed Lero estis malaperinta, ferminte post si la pordon. Baldaŭ la gardisto ree aperis, nur malferminte por ke li povu paŝi, turnis la ŝlosilon kaj metis ĝin en la poŝon. La fundo de la dormoĉambro estis malhela kaj Paŭlo ne povis ion vidi.

— « Mi timas ke vi havos malbonan manĝadon, sinjoro, » diris Lero; « sed mi pensas ke mi trovos kelkajn ovojn malsupre. Atendu kelkajn momentojn. »

Kaj, ne aŭskultante la protestojn de sia gasto, li eliris, kaj, kurante, malaperis.

Restante sola, Paŭlo rigardis al la ŝlosita pordo.

— « Kion do, » li diris al si mem, « ĉi tiu strangulo povas kaŝi en sia ĉambro ? Ĉu trezoron ? Aŭ ĉu kontraŭe, li, pro fiereco, ne volas montri la malriĉecon de sia lito, kaj deziras ke mi havu nur la vidon de lia plej bela ĉambro. Tamen la lito, kiun li preparis por mi, estas bona. Sed li mem diris ke ĝi estas dediĉata al lia estro ; sekve ĝi estas, kredeble, la plej bela. Sed jen penso ! Ĉu mi ne povos havi vidon, tra la fenestro, en ĉi tiun misteran ĉambron ? »

Li rapide eliris sur la terason kaj aliris la fenestron. Sed kurteno el blanka tolaĵo tute baris ĝin.

— « Mi estas preta ĵuri ke li eniris nur por tiri ĉi tiun kurtenon », li murmuris kolerete.

Li ĉirkaŭpaŝis la domon, serĉante aliun fenestron ; sed vane. Sur la norda flanko, nur unu fenestro, tiu de la unua ĉambro.

— « Fine, ĉi tion ne rilatas min », pensis tre saĝe Paŭlo ; kaj sidiĝinte sur la benko, ekster la domo, li sin tute dediĉis al la rigardado de la lastaj helaĵoj malaperantaj sur la profundo de l'ĉielo, kaj de la nokto leviĝanta el la malsupraĵo. Li estis revanta, kiam kapo aperis kelkajn metrojn antaŭ li, kaj Lero ekkriis gaje :

— « Mi havas nur tri ; tamen sufiĉas por malgranda ovajo. Al la laboro ! »

IX.

Ili eniris la domon. La urso ekbruligis malaltan kupran lampon, kiun li metis sur portilon pendantan de la plafono, malfermis unu el la ŝrankoj, el kiu li eltiris ferajn manĝilojn, fajencajn telerojn kaj simplajn glasojn, kiujn li ordigis sur la tablo. Apuden li jetis

duonon da sekala pano, kiu sonis kiel peco da ligno. Poste, li verŝis senpere la supon el la kaserolo en du telerojn, kiujn li alportis al la tablo, kaj tuj ekpreparis la ovaĵon.

Paŭlo, sidanta apud la fajro, kies varmo ripozigis liajn lacajn membrojn, sentis sin komforta, mirante, en si mem, ke la preparado de tiu malriĉa manĝo, tiel ĝojigis lin.

La urso dekroĉis la lampon, kaj ĝin metis sur pecon da trunko de juna lariko, ankoraŭ vestita de ĝia ŝelo, metitan sur la tablo, kiel lampportilo.

— « Nu, al la tablo ! » li ekkriis ; se la manĝo ne estas bona, tamen ĝi estos bone manĝata ; ĉu ne ? »

— « Jes, » respondis gaje Paŭlo ; « mi sentas min en tute responde stato. »

Ambaŭ komencis engluti, kun granda apetito, la terpoman kaj rizan supon.

— « Vi estas lerta kuiristo, » flatis Paŭlo.

— « Ne malfacile estas, kuiri terpomojn aŭ rapojn ; kaj mi ne havas multe da tempo por dediĉi al la kuirarto. Tamen, dum la vintro, mi fariĝas pli frandema ; kaj, kiam mi malsupreniras en la valon, mi neniam forgesas kunporti reen tritikan panon, kaj ankaŭ ovojn por fabriki pastaĵojn. »

Dezirante konservi la dommastron en lia nuna parolema humoro, Paŭlo laŭdis forte la ovaĵon, kaj tranĉis, por Lero, grandan pecon de la pasteĉo, kiun tiu ĉi manĝis, kun videbla plezuro.

— « Jes, » li diris, « oni ne bone ĝuas la aferojn tro kutimajn. Vi, kiu manĝas ĉiutage tritikan panon, ne scias kia frandaĵo ĝi estas. »

-- « Sed ĉi tiu sekala pano ŝajnas al mi bona. »

— « Ĉio nova, ĉio bona ! Vi baldaŭ preferus la tritikon. Same mi konfesas ke, ĉiujare, tre plezurigas min la supreniro de miaj najbaroj, kun iliaj bovinoj. Imagu kiel agrable estas trinki lakton, kiam oni estas senigita je ĝi, dum ok monatoj. »

— « Mi konsentas pri tio, » respondis Paŭlo ; « kaj mi liveros hodiaŭ deserton, kiun vi eble ne havas tre ofte. »

Samtempe li eltiris el sia saketo, ĉokoladajn frandaĵojn.

— « Vi eraras ; mi havas ĉokoladon en mia provizejo. Ĝi estas bona nutraĵo, prave lokita en la poŝo, kiam oni eliras frue matene por longa marŝado. »

Paŭlo surpriziĝis. Ĉokolado kaj sekala pano ne akordiĝas, laŭ lia opinio.

Post la manĝo, la du viroj sidigis antaŭ la fajro, kaj, trinkante iom da brando, komencis fumi. Lero, denove muta, sekvis per revema okulo, la fumajn volvaĵojn de sia pipo. Paŭlo serĉis novan kaŭzon por demando.

— « Tiom da pipoj vi havas ! » li diris, montrante serion da tiuj iloj ordigitan sub la kameno.

— « Unu ĉiujare, » respondis la urso. « Kiam, aŭtune, mi amasigas provizojn, mia lasta aĉetaĵo estas la kunulo de mallibereco, la ligna pipo, sur kiu mi skulptas la jaran nombron. Vi vidas la pasintajn pipojn. Ili similas ĉiu la aliajn, kiel la jaroj de mia vivo.

— « Vi estas filozofa. »

Lero levis la ŝultrojn.

— « Oni devas akcepti la vivon same kiel la veteron, kiaj ajn ili venas. »

Li apogis la kubuton sur la tablon, la kapon sur la manon, kaj per sia tenado, montris ke li dezirus esti trankvila. Paŭlo silentis kaj komencis torpori* antaŭ la fajro, pro la laciĝo. Li observis sian kunulon per dormemaj okuloj. Iun momenton, Lero sin levis, por ree plenigi sian pipon. Li staris kun la kapo preskaŭ nevidebla en la ombro de la lampŝirmilo ; sed kiam li ekbruligis la pipon, la flamo, ĉe ĉiu enspiro, lumigis

(*) *torpori* (L. *torpor*) = esti en stato preskaŭ senkonscia.

per fulmoj, lian krudan vizaĝon, kun blankaj dentoj, kaj briligis sovaĝe liajn nigrajn okulojn.

— « Ho ! », pensis Paŭlo, « li estas vera urso, la rajta loĝanto, la feo de tiu ĉi monto. »

Kiam Lero sidiĝis sub la radioj de la lampo, tiu, preskaŭ tima, impreso malaperis, kaj Paŭlo, direktinte la okulojn al la fajro, lasis sian fantazion vagi.

Tiam subite aperis la imago de lia fianĉino. Li miris ke li tiel longe ŝin forgesis. Ŝajnis ke la kara figuro estas surprizita, eĉ iom timigita, aperante en tian lokon. Tiu nekutima esprimo igis ŝin ankoraŭ pli ĉarma ; kaj Paŭlo ridetis al ŝi, kiam tondro lin ek-skuis.

— « Sinjoro ! Al vi estos pli bone dormi en via lito. »

Lero staras antaŭ li, kun lanterno ekbruligita en mano. Li sin levas, supreniras la gradaron per ŝancelaj paŝoj kaj apenaŭ respondinte la « bonan nokton » de Lero, rapidas sin senvestigi, kun la espero trovi sian agrablan revon, tiel maldelikate interrompitan.

X.

La sekvantan tagon, frue matene, la du viroj forlasis la domon, kaj tuj eniris la arbaron. La urso marŝis rapide antaŭen, kaj Paŭlo sekvis, rigardante al ĉiu flanko, kvazaŭ la vido estus ankoraŭ nova por li. Nune li povis, sen ia maltrankvilo pri la irado, tute libere ĝui la kvietecon kaj la gajecon de tiu arbaro, en kiu la freŝa matena aero vagas inter la senmovaj delikataj branĉoj. Li eksentis la impreson donitan de la alteco. Pro la maldensiĝo de l'atmosfero, la kvanto da oksigeno enpulgigata ĉe ĉiu enspiro, malpliigis. Tiam, por kompenso, la spirado iom akcelas sian ritmon, kaj

ankaŭ la sanga kurado. De tio venas agrabla sento de vigleco, kiu mirigis Paŭlon, ankoraŭ ne kutimintan al ĝi. Li ĝoje sekvis sian kondukanton, surprizita tamen ke anstataŭ supreniri, la urso iris preskaŭ horizontale tra la arbaro.

Ĉe turno de deklivo, li rimarkis ke la larikoj estas anstataŭitaj de pinoj, kaj demandis pri tio la gardiston.

— « Tial ke tiu flanko de la *kumb* rigardas al sudo ; kaj ne nur la arboj, sed ankaŭ la tera kovraĵo ŝanĝiĝis. Tie ne kuŝas herbaĵo, sed kreskas veproj* kaj en la printempo, tiu ĉi loko estas tute ruĝa de montaj rozoj. »

— « Ĉu abioj ne vivas en tiu ĉi lando ? »

— « Ili estas maloftaj. Mi havas aronda ili en unu *kumb* de mia monto, kaj mi devas ilin defendi kontraŭ la montanoj, kiuj deŝiras la branĉojn, por havi balaĵojn. Sed kredeble la monto estas tro alta, kaj ne havas sufiĉe da nutranta tero por ili, ĉar ili ne tre multiĝas, kaj ne atingas la belan kreskon, kiun tiu arbo prezentas en aliaj landoj. Cetere mi ne plendas pri tio, ĉar, kvankam ili ankaŭ estas montaj arboj, mi konfesas ke mi malpli amas ilin ol la larikojn kaj la pinojn. Iliaj nigraj arbaroj estas malsekaj kaj malgajaj. Precipe la piceoj, kun siaj longaj konusoj pendantaj, kaj branĉoj klinantaj al la tero, ŝajnas eterne plori. Niaj arbaroj havas pli viglan mienon. Vidu ĉi tiun ruĝan pinon. Kiel decida kaj obstina ĝi aspektas, kun sia kruda trunko kaj torditaj radikoj. Dum la vintro, ĝi havas multepezan ŝarĝon da neĝo por porti, kaj ĝiaj branĉoj kurbigas ; sed ĝi relevas la ekstremojn, ĉar ĝi rifuzas sin konfesi venkita. Tamen ĝi pliamas la varmon. Kiam la suno pikas, kaj abeloj zumas, ĝi ĝoje mienas kaj odorigas rezinon. »

(*) *vepro* (L. *vepres*) = kreskaĵo, kun lignaj branĉetoj, sen ĉefa trunko.

La du viroj estis alvenintaj ĉe la fundo de la *kumb*, kaj marsis la alian flankon, sur kiu la larikoj denove kreskis amase. Paŭlo demandis :

— « Ĉu vi ne preferas la larikojn ? »

— « Ho ! » respondis la urso, « ili estas la nobeloj ; ili prenis la freŝajn flankojn de l'monto, kaj lasis, al la plebanaj pinoj, la sekajn deklivojn. Vi vidas kiel fiere ili levas la kapon. Ili malŝatas la aliajn arbojn, nek permesas al ili, eniri siajn arojn ; ĉe la veprojn ili rifuzas, kaj volas nur glatan gramenan tapiŝon ĉe siaj piedoj. Ilia vestaĵo estas tiel dolĉa kiel la veluraj ŝtofoj, kiujn, laŭ la diroj, havis iam la grand-sinjoroj. Ili estas interne parfumitaj, ĉar ilia ligno vaporigas agrablan odoron, kiam oni segas ĝin. Tiuodoro estas facile rekonebla en la segejoj. Ĉe, iafoje, ĝi min avizas, dum promenado, ke oni ĵus dehakis larikon. Plie ili estas ruzuloj. Ĉar ili havas maldikajn branĉojn, ili faligas la foliojn, kiam la nego alvenas, kaj tiam, nudaj kiel stalaj baroj, ili ridas la vintrajn ventegojn. Pro tio, ili povas vivi en pli altaj lokoj ol la pinoj, kaj ĉe ĉe la sudaj deklivoj, kiam oni alveniĝas en la supraĵon, oni renkontas nur larikojn. Cetere oni devas konfesi ke tiu arbo estas vera riĉaĵo por la montanoj. Ĝia trunko, rekta, sen ia difektaĵo, kaj tre fortika, utilas por ĉiuspecaj traboj. La ligno, sorbigita de nevidebla rezino, mirinde rezistas* kontraŭ la putrado. Vi vidis ke, ĉi tie, oni kovras la domojn per larikaj tabuloj, kaj tiaj tegmentoj daŭras pli ol kvindek jaroj, sen ia rebonigo. Plie, la larikaj trunkoj, laulonge boritaj, tre bone taŭgas, kiel subteraj tuboj, por konduki akvon ĝis la vilagaj fontanoj. »

— « Ĉu vere ? Sed kiel oni kunigas iun kun aliu ? »

— « Tre simple. La forĝisto preparas feran kolumon, akritan je ĉiu rando, kiu estas pli larĝa ol la centra truo. Oni ĝin metas inter la du trunkoj, kaj oni

* *rezisti* (L. resistere) — daŭri en la sama stato, malgraŭ atako.

frapas sur la finon de la trunko lokota, ĝis ĝi tuŝas la jam lokitan ; kaj tiel, la fera kolumo eniĝas en la lignon de la du trunkoj. »

Paulo surprizigis, unue de la parolema humoro de la urso, due de la stranga irmaniero, kiun li uzis. Jen li marsis preskaŭ horizontale, jen li suprengrimpis direkte. Kelkfoje ili renkontis vojeton ; sed neniam Lero sekvis gin ; kontraŭe li ŝajnis rapidi por foriri de ĝi. Fine fariĝis videbla ke la urso revenis sur la flankon de l'monto jam tramarsitan.

— « Tiel ni evitis malbonan pasejon, » li klarigis al Paulo.

Ci tiu ne kontraŭdiris ; sed li komencis esti laca, kiam ili alvenis en senarban lokon, kies mezon okupis unu tre bela lariko.

En siaj densaj arbaroj, la larikoj ne havas mal-suprajn branĉojn, car la unuaj branĉoj, ne dikiginte, baldaŭ sekigas kaj defalas. Tial la trunko elsaltas, kvazaŭ nuda kolono, ĝis granda alteco. Sed la suprediriĝa arbo, kreskinte for de najbaroj, konservis mal-altajn branĉojn kiuj dikigis, kaj ĝi prezentis imponan eksterajon.

— « Kia bela arbo ! » rimarkis Paulo.

La urso ŝajnis kontenta.

— « Ni iom ripozu sub ĝi, » li proponis.

Paulo tuj jesis, kaj sin sternis sur la grame-no, dum lia kunulo, ankoraŭ starante, rigardis la arbon, preskaŭ ameme.

— « Ĝi estas mia », li diris.

— « Kiel la aliaj, mi supozas. »

— « Ho ne ! Neniu, krom mi, havas ian rajton sur ĝi. Cetere tio estas justa ; mi dufoje savis ĝian vivon. »

— « Kiel do ? »

— « Mi rakontos, » diris la urso sidigante. « Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis ankoraŭ junulo, mi alvenis ĉi tien, en iu mateno, kaj ekvidis ĉi tiun arbon

renversitan tere de terura uragano, kiu estis okazinta en la antaŭa nokto. La malfelica lariko estis ankoraŭ juna ; (gia trunko ne superis mian brakon), kaj pro ĝia izolita situacio kaj densa foliaĵo, ĝi ne povis rezisti la atakon ; kaj ĝi estis kuŝanta kun la duono de sia radikaro en la aero. Eble vi ridos, sinjoro, sed la vido de tiu bela arbo, kiu sajnis ploranta pri helpo, forte cagrenis min. Sen pluo da pripenso, mi maisupreniris hejmen, prenis pioĉon kaj ŝovelilon, kaj tuj ree supreniris ĉi tien. Mi sukcesis ree starigi la arbon, kaj enterigi la radikaron, kiu felice ne estis tro difektita. Longatempe mi premis la teron, per la piedoj, por fortikigi la vunditan arbon ; kaj kiam mi foriris, ĝi estis jam kara al mi. Dum kelkaj monatoj, mi ektremis pro ĝi, ce ĉiu ventego. Sed ĝi plene sanigis, kaj farigis la bela arbo, kiun vi vidas. »

Lero silentis, kun la penso perdita en la pasinto.

— « Kaj la duan fojon ? » memorigis Paŭlo, tre surprizita de tia sentemo ĉe kamparano.

— « Tio okazis antaŭ nelonge. Unue mi diros al vi ke la ĉi tiaj arbaroj apartenas al la komunumo de l'granda vilago, kiun vi vidis en la valo. Tamen neniu havas rajton dehaki ce unu arbon, sen la permeso de l'inspektoro de arbaroj. Tio estas facile komprenebla ; car sen tiu leĝo, kaj sen la gardistoj, la tiaj logantoj baldaŭ detruus siajn arbarojn. En ĉiu aŭtuno, la inspektoro, kune kun la komunumestro, kaj kelkaj konsilantoj, decidas kiujn arbojn oni povos dehaki sen domaĝo por la komunuma bieno. Estas kutimo ke tiam oni aljugas belan arbon al la gardiste. Nu do, foje okazis, ke ĉi tiu arbo estis inter la kondamnotaj al la morto. Tiam mi petis ke oni aljuĝu ĝin al mi, kaj mi rakontis kiel ĝi vivas nur dank'al mi. « Bone, diris la inspektoro, la arbo estas via. » Tiam, mi ekkriis : « Mi volas ke ĝi vivu ; malfelicon al tiu, kiu kuragus ektusi ĝin ! »

La urso salte starigis, pro la ekscito de tiu me-

moro, kaj karese sovis la manon sur malalta branĉo, kiu svingis, kvazaŭ la dankema arbo montrus ĝojon al sia mastro.

XI.

Pasis ankoraŭ iom da tempo en zigzagá suprenirado, kiam ili alvenis al piedo de rokoj. La urso ne haltis unu minuton.

— « Observu bone kien mi metas la piedojn, kaj faru same. »

Li tuj komencis rapide grimpi, saĝne ne atentante sian kunulon, kiu penis lin sekvi. Post laciga grimpado, dum kiu Paŭlo ne havis tempon ec por turni la kapon, ili subite alvenis en largan fendon, inter du ŝtonegoj. Tie, en printempo, dum la fluidiĝo de l'neĝo, pasis rivereto, kiu alportis iom da tero, ĉar gramena bedo kuŝas, sur kiu Paŭlo ekvidis multajn neĝflorojn.

— « Ili estas miaj », klarigis la urso. « Kiam mi vidis ke tiuj malsaguloj elterigas tiujn florojn, mi transportis kelkajn ĉi tien, en bonan kaŝejon, ĉar, krom la ĉamoj kaj mi, neniu ĝin konas. Tamen mi devas konfesi ke mi ne tre ŝatas ĉi tiujn florojn. Ili estas strangaj, sed ne belaj. Malgraŭ tio, mi ne povis elporti la penson ke ili, kiujn mi vidis dum mia infanaĝo, malaperus por ĉiam de mia monto. »

Li prezentis al Paulo grandan tranĉilon.

— Nu, prenu unu. Sed ĉu via fiancino ne postulos alian ? La virinoj estas emaj preterpostuli. »

— « Ne timu, sinjoro Lero, » respondis Paulo.

Li surgenuiĝis, kaj zorge elterigis unu kreskaĵon. Li rapidis, sentante la malkontentan rigardon de sia kunulo, direktatan al li. Tuj kiam li finis, la urso re-

metis, per piedo, la teron en la truon, kvazaŭ li volus malaperigi ĉiun postsignon de l'ago.

— « Ni malsupreniru, » li preskau ordonis.

La reirado komencis. Kiam ili estis denove ĉe la malsupro de la rokoj, la urso tuj ekmarŝis en la arbaron, kaj subite demandis :

— « Sekve vi fianĉigis en nia lando ? »

Paŭlo eksaltis pro surprizo. En aliaj cirkonstancoj, li estus malbone akceptinta la inviton ; sed li deziris forgesigi la eligon de la floro, kaj li detale klarigis kiel li konantigis fraŭlinon Meralen Parizo, kiel, post la peto pri ŝia mano, ŝia patro ekvojaĝis kun ŝi, ne ankoraŭ ion decidinte ; kiel, antaŭ kelkaj tagoj, li ricevis leteron alvokantan lin al Brigano, kaj tre gojis, ĉar la letero komprenigis al li ke li estos akceptata kiel fianĉo, k. t. p.

Li estis tiel okupata per sia rakonto, ke li ne rimarkis, ke, post rapida diagonala irado, ili estis sekvantaj vojeton, jam de kelka tempo. Kiam li estis ĉe la fino de sia babilado, la urso haltis.

— « Nu, sinjoro, vi devas nur daŭrigi sekvante ĉi tiun vojeton, kaj, antaŭ ol du horoj pasos, vi estos en via hotelo. »

Tiam Paŭlo embarasigis. Ĉu li ne devas fari monon donacon por la akcepto kaj la gvidado ? Li metis la manon en la poŝon ; sed la rigardo de Lero saĝnis al li tiel ironia, ke li preskaŭ ruĝigis. Li etendis la manon.

-- « Dankon, sinjoro Lero ; ĝis revido. Mi intencas ree viziti vin baldaŭ. »

-- « Kiel vi volos, » respondis la urso, sen entuziasmo.

Li premis la manon, kaj, turninte la dorson, rapide foriris. Paŭlo restis nekontenta.

— « Pro kio do mi timis donaci monon ! Li devas juĝi min senĝena, kaj tute ne malavara. Eble, pro tio, li

adiaŭis iom ne ĝentile. Sed mi povas ankoraŭ korekti mian mallertajon ; kaj la proksiman fojon mi estos pli decida. »

Trankviligita per tiu penso, li eltiris sian floron, rigardis ĝin karese, kaj fervore kisis. Tiam, remetinte ĝin zorge en la poson, li rekomencis la malsupreniradon.

XII

Letero de Paŭlo Deltur.

Kara fiancino.

Mi sendas hodiaŭ la floron, kiun vi deziris kiel fiancan bukedon. Do mi, de nun, estas rajtigita en mia titolo. Kiom vi estis prava ! Ĉarma estas tiu floreto, kiun mi pasie kisis, komisiante ĝin rakonti al vi pri mia amo. Mi senpacienas por ekscii ĉu ĝi alvenis en bona stato.

Nun mi komprenas ke mi devas rakonti al vi pri ĝia eltrovo. Sed mi hezitas. Vi eble pensas pri heroaj grimpadoj kaj vi mokos min. Sed kiel don Kihoto, tiu modelo de l'amantoj, mi ne devas timi la mokadon. Cetero vi vidos ke mi sukcesis, nur dank' al via helpo, kaj tio dolcigos vin. Ne miru ; vi tuj komprenos.

Do, kiel la brava kavaliro, mi ekkuris antaŭen al la konkerota* trezoro. Mi flame kuris, poste kurage grimpis, poste spirege rampis, ĝis kiam mi haltis ĉe la mezo de stonego, ne povante plu antaŭeniri, ĉar la stonego estas glata, nek ankaŭ reiri, ĉar, per mistero, la irejo, kiun mi estis uzinta dum la grimpadado, subite

(*) *konkeri* = akiri per batalo. A. conquer. G. erobern. F. conquérir. I. conquistare.

malaperis. Tiaj sorĉaĵoj ne mirigis don Kihoton. Sed mi humile konfesas ke mi estis malsupera en komparo kun li; kaj eble mi estus ankoraŭ en tia ridinda situacio, kaj vi (en ansio*, (almenaŭ mi esperas), se urso ne estus aperinta. Ne timu; tiu urso estis dupieda, sed, krom ĉi tiu negravajo, li estis vera urso, kiu malsupren ruligis min, kaj estas felice ke mi alvenis per la piedoj anstataŭ per la kapo. Tiel mi povis forkuri ĝis la hotelo, kie Sanso Pansa, la hotelisto, bonvolis sciigi ke li gojaŝ, ne havonte la okupadon pri mia enterigo.

La nokto estas konsilanto. La sekvantan tagon mi vekigis, kun bona ideo. Tiu besto, mi pensis, neneigeble, faris servon al mi; do ĝi ne povas rifuzi duan. Sekve, mi uzos ĝin kiel kondukanton. Sed ve! La ursoj ne konas la plej konsentitajn legojn de la civilizo; kaj la mia, kiam mi elmetis la demandon, gruntis tiel minace kiel lia kvarpieda samnomulo. Tiam mi vokis vin por helpo, kaj klarigis al tiu besto, ke la floro estas postulita de la plej bela kreitaĵo, kiu iam regis super la floroj. Li ridetis. Kompreneble ĝi estis nur urso rideto, kiu kuzas en la okuloj, ne sur la lipoj; sed mi tre bone vidis ĝin. Vi venkis; car, de tiam, la urso estis tre gentila kontraŭ mi. Li min nutris, provizis per bona lito, kaj la sekvantan matenon, kondukis min en ian kasejon, kusantan tute proksime al la cielo, kie kreskas neĝfloroj. Mi mem elterigis la plej belan. Ĝi devas nun paroli al vi pri la atendanto, kiu kisas milfoje vian malgrandan manon.

P. DELTUR.

Respondo.

Sinjoro Paŭlo,

Jes, la floro alvenis en bona stato; jes, ĝi tre plaĉis al mi. Cu mi kuraĝus konfesi ke mi ankaŭ kisis

(*) *ansio* (L. anxietas) = maltrankvileco pro timo ke malfeliĉo okazos. A. anxiety. G. Angst. F. anxiété. H. ansiedad. I. ansietà.

ĝin? Mi tion faros ; ĉar mi estas tre dankema al vi, pro la fervoro, kun kiu vi plenumis mian deziron. Mi divenas ke vi ne sparis la penon. Mi devas diveni, ĉar via sprita letero ne estas tre klariga. Eble vi pensis ke mi enprofundiĝos en pensojn pri ĝi. Ho ve ! kara Sinjoro, mi ne havas la tempon. Karolino estas senkompata. Pro la preteksto ke ni devas plene uzi la oportunecon ekkoni belan landon, ŝi organizas ĉiutage longan promenadon, kaj ni revenas ĉarmitaj, sed tiel lacigitaj, ke, post vespermanĝo, ĉiuj rapidas al lito. Tamen ne timu ke mi forgesas via ; Karolino sin okupas per memorigado pri vi, kaj, per siaj demandoj, devigas min senĉese laŭdi vin. Mi esperas ke, pro tio, vi pardonos al ŝi peton, iom nediskretan, kiun mi devas transdoni al vi. Mi parolis pri nia projekto al Karolino, ĉar ŝi miris pro la neesto de iu letero de vi. Sekve, kiam la floro alvenis, mi ne povis ne montri ĝin ; kaj tuj, kiel infanino, ŝi esprimis la deziron havi unu. Mi estis malkontenta de tiu peto, sed ne kuraĝis rifuzi skribi al vi. Do, se tio ne tro ĝenas via, sendu al mi duan floron ; sed ne kisu ĝin !

BERTO.

P. S. Mi esperas ke ni revenos post tri tagoj.

Paŭlo estis veninta al la poŝtejo por atendi ĉi tiun respondon. Elirinte, li kisis la leteron, antaŭ ol malfermi ĝin. Ĉe la unuaj linioj, liaj okuloj radiis ; sed baldaŭ lia vizaĝo malheliĝis, kaj post la tralegado :

— « La diablo prenu Karolinon ! » li kolere ekkriis, sen ia respekto por la amikino de sia fianĉino. « Kiel mi maltime nune returni al tiu malbenita urso? Mi antaŭvidas lian mokeman mienon, kaj mi estas preta juri ke li rifuzos tute senceremonie, se ne tute malĝentile. »

La surpriza gesto de pasanto konsciigis lin ke li

laŭte parolas. Iom konfuzita, li sin direktis al la hotelo, rulante en si mem malagrablajn pensojn.

— « Nune, mi komprenas kial tiu ruzulo kondukis min per tia zigzaga irado, kaj kial li igis min paroli pri Berto por blindigi min. Ja, estus tiel malfacila por mi, eniri lian kasejon, kiel retrovi kudrilon falintan en fojna kampo. Ĉu mi devas konfesi al mi mem, ke li estis prava, malfidante? Jes, ju pli mi turnas la aferon, des pli mi vidas ke ne estas alia rimedo. Mi devos humiligi antaŭ tiu vilagano, kiu, mi timas, ne estas, nune, bone inklina al mi. Sed ĉu mi sukcesos? Eble, li parolos malĝentile kontraŭ Berto. Ho! tion mi ne povos suferi. Sed kion mi faros? Ĉu ni batos unu la alian? Ridindaĵo! Ne; kio ajn okazos, mi restos malvarma, tre malvarma! »

Kaj, per sia bastono, li frapis sur la ŝtonojn de mureto, laŭ la vojo, kun tia forto, ke fajrero elsaltis el la fera pinto.

XIII.

Nenio pli ol bona manĝo, kapablas remeti la ŝentojn en ordon. Ĉar, tiun tagon, la kuiristo de l'hotelo estis rimarkinde lerta. Paŭlo grade kvietigis. Kiam, post la kafo, ekbruliginte cigaron, li ekmarŝis, li estis reakirinta bonan humoron.

— « Mi maloportune maltrankviligis, » li diris al si mem. « Lero mokos min. Bagatelo! Mi ankaŭ mokos min; kaj laŭdos lian divenemecon. Tio plezurigos lin. Mi nur devas elpensi kiel mi povos forigi la malbonan impreson, kiun eble li ricevis pro mia ŝajna avareco, kaj poste elmeti la aferon en maniero, kiu gos lin ridi. Mi havas kvar horojn por mia prepar-

ado ; tio sufiĉos, aŭ mi devos konfesi ke mi estas mal-spiritulo. »

Sed li baldaŭ komprenis ke la afero estas pli mal-facila ol li pensis. Ni devas rimarkigi, por lia senkul-pigo, ke korpa penado estas malbona akompananto por spirita verkado. Ŝajnas ke, en nia neperfekta organis-mo, la animo kaj la *aliulo* (kiel diris X. de Maistre) ne povas samtempe laboradi. Plie, Paŭlo vagadis en ne-certeco pri la maniero alparoli la urson. Lero estas videble pli riĉa kaj pli edukita ol ordinara vilaĝano ; sed ĝis kia grado ? tion li ne povis decidi. Jen li penis fajli spritan elmetadon de sia peto, kaj subite ekpen-sis : « mi malsaĝas ; li ne komprenos. » Jen li memo-rigis al si plebanajn ŝercojn ; sed li sin demandis : « Ĉu mi havos la konvenan tonon ? precipe se tiu mal-benita urso rigardos min per sia moka okulo. »

Dum li estis okupata per tielaj pensoj, la tempo pasis, kaj la distanco malgrandiĝis ; kaj Paŭlo, pres-kaŭ senkonscie, alvenis en la vilaĝeton. Tiam li ko-mencis sin senti iom pli maltrankvila, kaj ne volante permesi kreskadon al tiu malagrabra impresoj, li decide ekgrimpis la lastan deklivon, ĵetante alvokajn kriojn, al kiuj li penis doni gajan tonon. Nenia respondo. Eble Lero forestas. Tiu penso lin ĝojigis pro la superflua tempo, kiun li havos. Efektive, puŝinte la pordon, li vidis la ĉambron bone ordigitan, sed sen ĝia mastro.

La radioj de l' subiranta suno lumigis la plafonon kaj verŝis gajigan senton. Paŭlo sidiĝis kaj ĉirkaŭrigard-is. Subite li sentis preskaŭ skuon. Direktinte la okulojn al la pordo de l' dormoĉambro, li ekvidis la ŝlosilon en la seruro. Tuj la scivolemo lin ekposedis. Tamen li he-zitis, kiam bonega preteksto alkuris en lian cerbon.

— « Eble, li estas en sia dormoĉambro, » li diris.

Kaj, sin levinte, li frapis al la pordo, kvazaŭ li vere atendus respondon, kaj rapide li larĝe malfermis.

Fluo de suna lumo enversiĝis en la ĉambron, kaj

Paŭlo restis ŝtonigita. En orita kadro, portreto de juna virino, mirinde bela, rigardas al li.

Ŝi estas vestita per la nacia kostumo de Normandaj virinoj ; sed la riĉeco de l' ŝtofoj kaj la delikateco de l' vizaĝo, sufiĉe montras ke ŝi neniam sin okupis pri plebana metio. Mirigita de vido, kiun li tiel malmulte suspektis, Paŭlo ekzamenis la ĉambrom por serĉi klarigon. La ĉambro estas tre simple meblita, tute el larika ligno, sed aspektas tre komforta, ĉar la muroj estas vestitaj, ĝis la plafono, per ligna kovraĵo, tiel ke la blankeco de ŝtono nenie vidiĝas. En la angulo maldekstra estas la fenestro kaj apude skribtablo kovrita de paperoj. Super ĝi, du bretoj ŝarĝitaj de libroj. La angulo dekstra estas ankaŭ kovrita per libroj, de la planko ĝis la plafono. Meze de l' ĉambro, fajenca forno. Kontraŭ la muro, horloĝo, kies granda pendolo balancas antaŭ du feraj masoj subtenitaj de ŝnuroj. La fundo de l' ĉambro estas okupata de ligna lito ; kaj en la du anguloj postaj, pendas kurtenoj, kiuj sendube kovras vestojn. Ĉe la piedo de l' lito, sur la sama muro, kie troviĝas la fenestro, kaj sekve nevidebla el la eksteraĵo, super granda komodo, estas alkroĉita la rimarkinda pentraĵo, kiu baldaŭ ekposedis denove la atenton de Paŭlo.

Banata de sunbrilo, la aperaĵo havis eksterordinaran esprimon de viveco. Kiu ŝi estis ? Videble la mortinta edzino de Lero, ĉar li havas filon. Kiel pasie kaj strange rigardas ĉi tiuj okuloj, same verdaj kiel la oceana akvo ? Neniam la tranĉa spiro de l' montoj mordis ŝian blankan haŭton, aŭ senkolorigis ŝiajn blondajn silke brilajn harojn. Sed kiu do estis Lero ?

Subite bruo elpuŝis Paŭlon el liaj profundaj pensoj, kaj igis lin turni. En la unua ĉambro, staras la urso, kun la brakoj krucitaj sur la brusto, kaj, ĉe la fundo de liaj nigraj okuloj, flamas malhela kolero.

Nenia krimulo, ekkaptite en plena farado, ŝajnis pli fulmofrapita ol Paŭlo, ĉe tiu subita apero. Li pal-

iĝis, ruĝiĝis, denove paliĝis. Kiam li ekpensis pri la parolado, kiun li tiel malfacile preparis, la kontrasto kun la situacio, en kiun lia senpripensa scivolemo ĵetis lin, metis tian malordon en lian cerbon, ke li sin sentis tute preta por transsalti la pordon malfermitan kaj forkuri per la tuta forto de siaj kruroj.

— « Vi forestis . . . Mi vin serĉis . . . , » li balbutis per tremanta voĉo.

— « Mi bone vidis ; sidiĝu, » interrompis Lero, per voĉo pli ordona ol gastama.

Paŭlo obeis senvoĉe. Lero promenis kun ekscitita mieno ; sed kiam li rigardis al la junulo, tia malespero estis videbla sur liaj belaj trajtoj, ke li kompatis. Lia fizionomio prenis pli dolĉan esprimon, kaj eĉ io, kiu ŝajnis rideto, ekaperis sur lia kruda vizaĝo. Li ankaŭ sidiĝis.

— « Vi devis multe suferi pro la varmo, dum la suprenirado, » li diris en tute ŝanĝita tono.

Paŭlo sin sentis profunde kortuŝita. Li sin levis.

— « Sinjoro, pardonu min. Mi hontas mian nediskretan scivolemon. Legu ĉi tiun leteron. »

Eltirinte, el sia brustopoŝo, la leteron de Berto, li ĝin prezentis. Lero, silenta, ĝin prenis, kaj legis unue la adreson, poste la leteron, dum Paŭlo penis diveni liajn sentojn ; sed nur malgaja rideto aperis sur liaj lipoj. Je la fino :

— « Kaj kompreneble ne estas eblo rifuzi », li diris.

Poste, kiel parolante al si mem :

— « Tamen oni devus scii kiel diri : ne. Sed malfacile estas malĝojigi amatan personon. »

Tiam, post momenta meditado :

— « Sinjoro Deltur, vi havas la floron, kiun vi bezonas. Sed mi mem prenos ĝin morgaŭ matene. Vi atentos min ĉi tie. Mi havas librojn, kiel vi vidis ; vi trovos kredeble ion legindan por pasigi la tempon. Jen la kaŝejo por la ŝlosilo. »

Por ĉesigi la konfuzon naskitan en Paŭlo de tiu aludo, li sin levis.

— « Nu ; estas tempo por prepari la fajron, kaj la vespermanĝon. »

— « Permesu ke mi preparu la fajron, » ekkriis Paŭlo, « mi tre dezirus taŭgi por io. »

— « Kiel vi volos, » rediris bonhumore la urso.

Paŭlo, kun tre atenta mieno, konstruis edificon el lignaj pecetoj, kiun li ekbruligis, kun infana ĝojo, dum Lero pretigis manĝon, kiu tre similis tiun, kiun jam Paŭlo havis en lia societo. Sed tiufoje, li ankoraŭ pli ĝuis ĝin, ĉar li sin sentis apudestanta kun amiko.

XIV.

Post la manĝado, kiam ĉio estas en ordo, la du viroj sidis antaŭ la fajro, kaj komencis la fumadon. Lero estis silenta kiel kutime, sed Paŭlo sentis ke li povas demandi lin pli libere.

— « Ĉu vi neniam enuas, Sinjoro, vivante tiel tute sola ? »

— « Mi ne estas sola. Mi vivas kun la monto, kiun mi pasie amas. »

— « Ĉu vere tia amo sufiĉas ? »

— « Kial ne ? se ĝi estas sufiĉe granda. Mi estis ankoraŭ infano, kiam mi komencis senti ĝin ; kaj mia unua amatino estas malgranda valetto, kiu kuŝas ĉe la supro de najbara monto. Estis la unua fojo kiam mia patro kondukis min tiel alten ; kaj la impresoj, kiun mi ricevis, enirante tiun valeton, estis tiel forta, ke, dum kelkaj tagoj, mi forkuradis de miaj samaĝaj kunuloj, kaj kaŝadis min, por libere revadi pri la paradizo, kiun mi estis ekvidinta, kaj por envii la sorton

de l' marmotoj, kiuj tie vivadis. Nu vi vidas ke, en mia maljunaĝo, mi realigis la revon de mia plej frua infanaĝo. »

— « Sed ĉu en la sama valetto ? »

— « Ne. Mi neniam revidis la valetton, kiun mi aludis. Kiam geamantoj maljuniĝis unu for de la aliu, ili devos eviti sin renkonti reciproke. »

— « Ĉu do vi timas ke ŝi fariĝis maljuna ? », interrompis Paŭlo ridetante.

— « Ne ŝi ; sed mi maljuniĝis, kaj tio sufiĉas. Mi bone scias ke mi ne retrovus tie la infanan impreson. Plie, mia prudento komprenigas min, ke ĝi tute similas al la aliaj kiujn mi havas en mia monto. »

Lero silentis ; kaj Paŭlo ne kuraĝis demandi pluen. Sed li rigardis sian kunulon, kun tiel interesita mieno, ke ĉi tiu, post sufiĉe longa hezitado, decidis akcepti la mutan peton de liaj okuloj.

— « Mia patro estis unu el la du estroj de firmo por la konstruado de ŝipoj en la Normanda urbo Granville. Sed li edziĝis en tiu ĉi lando, kien li kutimis veni, por aĉetado de larikaj trunkoj. De tiu tempo, miaj gepatroj ĉiujare pasigis kelkajn monatojn en Briggan. Tiam, de mia infanaĝo, mi memoras alternan vivon de helaj periodoj, tiuj de la vivado en Alpoj, kaj de aliaj grizaj, tiuj de la estado en Normandujo, kiun mi tiam malamegis. Mi ne bezonas diri, ke, de tiu tempo, mi fariĝis pli justa kontraŭ bela lando. Eĉ mi intencas revidi ĝin iun tagon, sed ne dum longa tempo, ĉar, tie, la ĉielo estas tro malalta ; mi ne povas tute libere spiradi. Cetere, tiam estis la licea tempo, kaj kvankam mi ĉiam dece lernis, mi ne estis unu el tiuj maloftaj infanoj, kiuj sopiras la studadon.

Mi apenaŭ sukcesis la finan ekzamenon, kiam mia patro mortis, kaj baldaŭ mia patrino lin sekvis. Ili ambaŭ, laŭ sia volo, estas enterigitaj en la Briggan'a tombejo. — Mi restis izolito ; sed la asociato de mia patro tre amikis min, kaj faris min subdirektoro de la

firmito. Tiam mi estis tre okupata; kaj, dum kelkaj jaroj, mi ne revidis la Alpojn. Iun tagon, enirinte en la salonon de mia estro, mi tie trovis lian filinon, kiu ĵus revenis el la monaĥinejo, kie ŝi estis edukita, ĉar ŝia patro vidviĝis tre frue. Ŝia rimarkinda beleco tuj flamigis mian animon. Vi vidis ŝian portreton. Ĝi estis farita de l' fama pentristo Lorenz, kiu, ankoraŭ nekonata, venis ĉiujare en Normandujon por pentri. Li postulis ke ŝi vestu la nacian virinan kostumon, kaj li estis prava. Tiela, ŝi estas ĉarma, ĉu ne vere ?»

Paŭlo, kompreneble, jesis; kaj Lero, post momenta revado, reparolis.

— « Feliĉa tempo, tiu de nia fianĉiĝo! Tamen mi memoras malgrandan aferon. Iun vesperon, kiam mi estis priskribanta al ŝi la Alpajn landojn, ŝi interrompis min. « Ho! Dum vi parolas pri via lando, kiel brilas viaj okuloj! » Mi ridis, sed malagrabra impresio min ektuŝis; ĉar ŝajnis al mi ke iom da kolero estis soninta en ŝia voĉo. Mi eksentis ke ŝi estos ĵaluza. »

— « Ĵaluza al lando! » ekkriis Paŭlo; « ĉu tio povas esti? »

Lero levis la ŝultrojn.

— « Kial ne? Kiam virino postulas la tuton de l'animo de viro, ŝi ĵaluzas kion ajn li amas; kaj komprenu, sinjoro, kiam virino amas nenion, krom sia edzo, tio ne estas bona.

Tamen, en la komenco, ĉio iris bone. Post nia edziĝo, ni vojaĝis ĉi tien, kaj mia edzino tre admiris la montojn, precipe tiun-ĉi, sur kiu ni ofte promenis. Ŝi kunportis reen en Normandujon, fotografajojn, kiujn ŝi alkroĉis en sia dormoĉambro; kaj ni ofte babilis pri ili. Sed, iam post iam, mi rimarkis ŝanĝon. Miaj aludoj pri la Alpa lando komencis esti malvarme akceptataj. Ŝi rifuzis min akompani, dum nova vojaĝo, pro la preteksto ke ŝia farto ne estis sufiĉe bona. Mi venis sola, sed mi mallongigis mian vojaĝon, kaj ne plene ĝuis

ĝin, ĉar mi sciis ke mia edzino kalkulis la tagojn de mia forestado.

Reveninte hejmen, mi trovis la fotografaĵojn transportitaj en mia skriboĉambro, kaj komprenis ke mia edzino ne povis plu elporti ilian vidon. Mi estis kunportinta dikan bukedon da lavandaj floroj ; sed ŝi diris ke laodoro kaŭzas al ŝi kapdolorojn, kaj mi kaŝis la bukedon en la fundon de tirkesto de mia biblioteko. Kelkfoje, mi malfermis la tirkeston, kaj kvazaŭ bloveto de Alpa aero eniris en la ĉambron, kaj igis mian animon flugi ĝis la ŝtonaj deklivoj, kie mi iam deŝiris la floretojn. Sed mi devis malfermi la fenestrojn poste, pro timo, ke mia edzino eksentus la malamatan odoron.

En la najbaraĵo, estis du lokoj, kiujn mi pliamis. En unu, kreskis arbareto de abioj, kaj tie, mi kutimis sidadi, kun la manoj sur la okuloj, streĉante miajn orelojn al la mallaŭta sibrado de l'venteto tra la rigida foliaro. En la aliu loko, estas du ŝtonegoj kaj inter ili la tero kovriĝas per tiu sama mallonga grameno, simila al verda drapo, kiu troviĝas en niaj montoj. Tie, kiam la suno brilis, mi kuŝiĝis sur la ventron, penante enfermi en la vidaĵon, nur la gramenon kaj la malsupron de ŝtonego, kaj kiam formiko eniris en mian peceton da memoraĵo, mi sekvis ĝin per amika rigardo.

Sed mi devis kaŝi tiajn promenadojn, ĉar ve ! eĉ la naskiĝo de nia infano ne povis liberigi mian edzinon de ŝia ĵaluza turmento.

Ho ve ! Baldaŭ mi havis pli gravan kaŭzon por malĝojigi ; ĉar mia edzino pli kaj pli malsaniĝis, kaj mi anxie vidis ŝian vizaĝon paliĝi kaj malgrasiĝi. Iun tagon, ŝi subite rememorigis nian vojaĝon al Alpoj ; ŝi ree postulis la fotografaĵojn, kaj ŝi ekparolis pri nova vojaĝo efektiva. Mi sentis teruron, ĉar tia ŝanĝo ŝajnis al mi anonco de proksima morto. Iun vesperon, kiam ŝi babilis pri tiu temo, mi tiel doloris*, ke mi ne

(*) Pri tiu senco de *dolori*, vidu konforman ekzemplon en la *Krestomatia* p. 129 l. 18.

povis min deteni de plorado. Tiam, ĉirkaŭpreninte mian kolon, ŝi murmuris en mian orelon : Kiam mi estos mortinta, kunportu min en cian landon, en nian landon ! »

La voĉo de Lero raŭkiĝis ; kaj li haltis, dum dikaj larmoj brilis sur liaj brunaj vangoj. Paŭlo, profunde kortuŝita, silentis ; kaj, en peza senbruo, nur aŭdiĝis la krakado de fajreroj. Fine Lero diris mezavoĉe :

— « Ŝajnas al mi ke ŝia animo flugas ĉirkaŭ mi, en tiu ĉi monto, kiun ŝi iam preferis. »

Post momento, li rekomencis, en tono pli firma :

— « Tiam pasis la plej malhela periodo de mia vivo. Sed mia fileto gardis min de malespero. Mi multe laboris por li ; ĉar pro la morto de mia bopatro, mi fariĝis la sola estro de la firmo. Fine mia filo estis sufiĉe riĉa ; kaj li devis iri Parizon por sin prepari al la ekzameno de la arbarista lernejo, ĉar li elektis la arbaristan profesion. Tiam mi vendis la firmon, kaj petis la oficon de arbara gardisto por ĉi tiu monto. Mi konstruigis mian domon de la vilaĝa ĉarpentisto, vestigis min per la samaj vestoj kiel la vilaĝanoj, lernis ilian lingvon, kaj mi fariĝis la urso ! »

XV.

Lero stariĝis, kaj ree plenigis sian pipon. Li videble opiniis ke la rakonto estas finita. Sed Paŭlo, iom hezitinte, demandis :

— « Kaj via filo ? »

— « Li estas nun ĝenerala gardisto ; baldaŭ li fariĝos inspektoro de arbaroj ; kaj eble li venos en Brigano. Tiam li estos mia estro ; kaj mi havos favoran estron, mi pensas. »

Lero ridetis. Paŭlo, kuraĝigita, daŭrigis la demandadon.

— « Kiel agas la vilaĝanoj kontraŭ vi ? »

— « Ili iom timas min, kvankam mi ĉiam estis ĝentila kontraŭ tiuj, kiuj ne dehakas arbojn, aŭ ĉasas sen permeso, sed mi estas mistero por ili. »

— « Fine, vi estas feliĉa ? »

Lero levis la ŝultrojn.

— « Mi vivas mian normalan vivon. Tio povas esti nomata feliĉeco. Vi konas la esprimon, *feliĉa kiel fiŝo en akvo*. Ĝi ne estas tre ĝusta, ĉar la fiŝoj ne ŝatas la feliĉecon vivi en akvo, antaŭ ol kiam ili estas kaptitaj. Sed mi estis longatempe eltirita el akvo; sekve mi ĝuas retrovinte ĝin. Mi neniam sentas enuon. Eĉ mi ne povus diri kian sezonon mi pliamas. En printempo, kiel ĉarme promeni inter la larikoj kovritaj de novaj folioj flavverdaj kaj de ruĝaj floretoj. En somero, kiel agrabla post laciga marŝado en varmo, ripozi en la vespera freŝo, sur la teraso, admirante la kontraŭajn neĝajn kulmenojn, roze kolorigitajn de l'rebrilo de ruĝaj nuboj. En aŭtuno la folioj de larikoj fariĝas subite heleflavaj kaj kiam la radioj de l'subiranta suno eniras la arbaron, la vidaĵo estas nepri-skribeble bela. Poste, alvenas la vintro, la stranga sezono. Tage, lumo preskaŭ neelportebla vestas la neĝon. Nokte, la malvarmo estas tiel terura, ke la aero mem ŝajnas ŝtone frostigita, kaj en tiu absoluta senmovaĵo, nur la steloj dancas, ĉe la fundo de ĉielo nigra, kiu pezas sur la blankaj montoj. Ifoje urugano alkuras, kaj dum la blovado ululas*, kaj aljetas riveron da neĝo kontraŭ la fenestrojn, mi trankvile legas en la kvieta lumo de mia kara lampo. Mi ne timas la vintron kun miaj libroj. Cetere, kiel mi jam diris al vi, mi havas iom da okupado interne. De tempo al tempo, kiam la neĝo estas konvene firma, mi malsupren-

(*) *ululi* (L. ululare). Tiu verbo klarigas sian sencon per si mem.

iras en la valon, por iaj aĉetoj, sed baldaŭ mi ekmemoras ke, en domo enneĝigita, horloĝo regule tiktakas atendente, kaj aldeziro nevenkebla kaptas min. Tranĉinte la babiladon de miaj vilaĝanaj amikoj, mi rapidas al la dezertaj deklivoj. Ne ; la vintra tempo ne ŝajnas al mi longa. Eĉ mi salutas ĝoje la unuan neĝadon. Tamen, ĉiujare, mi vidas kun plezuro, la teron malbrilan reaperi, unue en la valo, poste sur la monto, kaj la vivon ĉie renaskiĝi. Tiel, homo ĉiam alvokas la estonton, kiu devoras* lin pecon post peco. »

Lero deskuis la cindrojn de sia pipo, kaj sin levis, komprenigante Paŭlon ke la vespera babilado finis.

XVI.

La sekvantan tagon, kiam Paŭlo vekigis, la tago estas jam de longe komencinta, ĉar li profunde dormis. Li rapide sin vestis, kaj malsupreniris. Neniu en la manĝoĉambro. Li frapis al la pordo de la dua ĉambro ; nenia respondo. Post iom da hezitado, li prenis la ŝlosilon en la antaŭe montrita kaŝejo, kaj malfermis. La ĉambro estis jam ordigita, kaj prezentis allogantan aspekton de kvieta ripozejo. Paŭlo intencis ekzameni la bibliotekon ; sed liaj okuloj nevole sin turnis al la portreto de l'juna virino, kies malgajan historion li nun konas. Tiam, interne vekigis stranga sento, kvazaŭ la portreto lin rigardus per vivaj okuloj, kaj riproĉus lian ĉeeston en la ĉambro de sia edzo. Li memoris ke Lero diris ke ŝia animo flugadis ĉi tie, kaj iom impresita, li eliris, fermante post si la pordon, kaj remetis la ŝlosilon en la kaŝejon.

(*) *devori*. L. devorare. A. devour. G. fressen. F. devorer. H. devorar. I. divorare.

Ekstere, la suno brilis. Decidinte fari matenan promenadon, Paŭlo sekvis malgrandan vojeton, kiu rampis sur flanko de l'monto, kontraŭa al tiu jam tramarsita de li kun Lero. Post duonhoru, li alvenis en verdan valetu, en kiu rivereto serpentiris, kaj kie estis disŝutitaj blankaj dikaj ŝtonoj, iam falintaj de la ĉirkaŭantaj krutaĵoj. Aro da bovinoj tie sin paŝtis en malrapida marŝado; kaj, jen ĉi tie, jen tie, tintis la sonorilo, kiun ĉiu besto portas ĉe la kolo. Juna knabo, sidanta sur ŝtonego, rigardis senmova.

Paŭlo ĉarmita de tiu neatendita apero, sidiĝis sur ŝtonon, kaj lasis sian rigardon vagi sur la trankvila pejzaĝo. Subite, en la arbaro, kiu kovris deklivon antaŭ li, eksonis kantu :

« Mi ŝin amegas en blanka vestaĵo ;
Kiam, ĉe l'tago, ŝi glorie radias,
Aŭ, dum la nokto, l'aeron lumigas.
Bela, sed ankaŭ ŝi estas aminda ;
Ĉar, sub la faldoj de l'vintra mantelo,
Zorge montanon ŝi ŝirmas de l'frosto.
Mia amata
Estas la monto ! »

Certe estis Lero kiu kantas, kvankam lia voĉo havas nekonatan vibrantan tonon. La melodio estis tre simpla, kaj kredeble, en salono, Paŭlo opinius ĝin vulgara; sed sonante en tiu pura aero, ĝi ŝajnis al li tute ĉarma.

« Mi ŝin amegas en verda veluro ;
Kiam ŝi goje per floroj ornamas
Glatan atlason de l'altaj herbejoj ;
Kiam ŝi kantas per ŝaŭmaj torentoj,
Kaj per graciaj sibilantaj larikoj,
Himnon al Dio, kreinta ŝin bela !
Mia amata
Estas la monto ! »

La voĉo alproksimiĝis. Paŭlo sin kaŝis post ŝtono, por ke lia vido ne haltigu la kantanton.

« Mi ŝin amegas en oro vestitan.
Ŝi sub vualo, de l'suno teksita,
Hele ridetas kaj dolĉe murmuras :
Mi ne ŝanĝiĝis ; pasinton memoru.
Ĉiam amike mi kun ci gojiĝis
Aŭ ĉagreniĝis ; fidelan min amu !
Mia amata
Estas la monto ! »

Lero nun estis tute proksima. Paŭlo sin aperigis kaj aplaudis per ambaŭ manoj. Nenia aŭtoro estas senta kontraŭ laŭdoj, kaj Lero, kiu jam estis kunpremita la brovojn, ekridetis.

— « Vi estas ankaŭ poeto, sinjoro, » diris ĝentile Paŭlo, etendante la manon.

— « En la sama grado, laŭ kiu mi estas lignajisto. Sed mi verkas miajn versojn nur por mi mem, kiel ankaŭ mi faras miajn meblojn, kaj vi aŭdis min per surprizo. »

— « Mi ne povas penti pri tio. Cetere mi ne estus pensinta ke vi tiel frue revenos, kaj per tiu flanko. »

Lero ankoraŭ ridetis.

— « Mi prenis alian vojeton pli mallongan sed pli malfacilan » ; kaj por eviti al sia gasto neagrablan memoraĵon : « Jen via floro. Nun estas tempo por reiri hejmen. »

XVII.

Kiam ambaŭ alproksimiĝis la vilaĝeton, ili vidis junan montanon, kiu rapidas al ili, farante signalajn gestojn. Alveninte li klarigis :

— « Mi venas de la hotelo, kien mi portis buteron, kaj la hotelisto demandis min pri la sinjoro. Eksciinte ke li estas tie ĉi, li postulis ke mi alportu al li telegramon, kiu alvenis hieraŭ vespere. »

Kaj li prezentis al Paŭlo bluan paperon. Ĉi tiu, per ekscitita mano, disŝiris la koverton, kaj avide legis.

— « Dankon, amiko. Jen por vi. »

Kiam la montano estis foririnta, li sin adresis al la urso.

— « Sinjoro, mia fianĉino plifruigis sian revenon. Ŝi alvenas hodiaŭ. Kion ŝi pensos pri mi, se mi ne alestos ĉe ŝia eliro el la vagonaro ? »

— « Sed vi forestas pro ŝia servo. Kiel do ŝi povus koleri ? »

— « Tamen mi tre dezirus alesti. Je kioma horo alvenos la vagonaro ? »

Lero eliris ŝtalan poŝhorloĝon.

— « Nun estas la duono de la deka. Restas ankoraŭ du horoj kaj kvin minutoj. »

— « Ĉu via horloĝo ne malfruas ? » diris Paŭlo rigardante al la sia.

— « Ne. Kvankam mia poŝhorloĝo ne havas luksan eksterajon, ĝi entenas la plej precizan meĥanisman. Sed vi ne havas sufiĉe da tempo. Venu hejmen, por iom manĝi, antaŭ ol malsupreniri. »

— « Ne, sinjoro ; mi dankas vin ; sed mi volas provi tujan malsupreniradon. Eble, per kurado, mi sukcesos. »

— « Nu ; venu kun mi. Mi montros al vi la plej mallongan irejon. »

Li trairis oblikve la arbaron. Tiun ĉi fojon, Paŭlo ĉiam iris antaŭen kaj Lero sekvis ridetante. Post kvarono da horo, Lero montris iun *kumb*.

— « Nun, vi devas malsupreniri tute rekte. La *kumb* estas iom glitiga ; sed ĝi estas ĉie kovrita de grameno ; kaj se vi falos, vi ne havos malbonon. Plie, vi komencas havi montanan piedon. »

— « Adiaŭ, sinjoro Lero, dankon. Mi neniam forgesos vian bonan akcepton. »

Kaj rapide preminte lian manon, Paŭlo ekkuris. La urso lin sekvis per la okuloj, dum li estas videbla. Poste, li, ridetante, levis la ŝultrojn, kaj komencis supreniri per sia regula paŝo.

XVIII.

Paŭlo meritis la laŭdan diron de l'urso ; ĉar li saltadis malsupren kiel ĉamo. Sed la monto ne havas plu ian eron da allogeco por li ; kaj li rigardis nur al siaj piedoj, kio estis tre necesa, por diri la veron.

Ruĝa kiel papavo, spireganta kiel blovilo, li haltis, ĉe l'eliro de la arbaro, por viŝi la ŝviton de sia frunto, kaj trankviligi la batadon de sia koro.

-- « Ho !, li ekkriis gaje, » rigardintè al sia poŝhorloĝo, « la urso estus surprizita, se li scius ke mi uzis nur unu horon por malsupreniri ĝis tie ĉi. Estas vere ke mi akiris montanan piedon. »

Kaj li fiere saltis antaŭen sur rondan dika^o ŝtonon. Sed la Tarpeja roko najbaras la Kapitolon. Liaj ŝuaj najloj glitis sur la ŝtono, kaj li peze falis tute plate, dum la ŝtono elpulsita el sia ekvilibro, ruliĝis

malrapide, kaj baldaŭ haltis sur malgranda lariko, kies trunkon ĝi kurbigis kaj premis.

Feliĉe Paŭlo kvitiĝis per forta kontuzo. Li sin levis, iom malfacile, kaj rigardis kolere al la kaŭzo de sia falo. Tiam li sin sentis iom kulpa kontraŭ la malfeliĉa arbeto, kaj penis forigi la ŝtonon kiu premis ĝin. Sed la ŝtono estis peza kaj rezistis. Baldaŭ li ekmiris pri sia ago.

— « Ĉu la malsano de tiu strangulo kaptis min ? Mia fianĉino alvenas, kaj mi turmentas min pri arbaĉo ! »

Li stariĝis por ekkuri ; sed interna riproĉo haltigis lin. Li trenis sur la deklivo ŝtonon, sur kiun li apogis la dorson, kaj metinte la piedojn sur l'aliun ŝtonon, sukcesis per forta streĉo, iom movi ĝin kaj liberigi la trunkon, kiu sin preskaŭ tute relevis.

— « Nu, amiko, la naturo cin sanigos. Neneigeble mi estas pli infektita ol mi supozis. Feliĉe, mi tuj ŝanĝos la atmosferon. »

Kaj li rekomencis la kuradon.

XIX.

Tiun vesperon, en komforta ĉambreto de la hotelo, sinjoro kaj fraŭlino Meral kaj Paŭlo Deltur gaje kunmanĝis, kaj Berto sin amuzis, incitetante la junulon.

— « Paĉjo, mi malpravis, dirante al ci ke tiu malfeliĉa sinjoro Deltur ĝemas dum la tuta longo de l'tago, kaj ke ni devas mallongigi lian turmenton. Ni vidas ke li estis tre okupata, lernante la filozofion de saĝulo, kaj tute ne pensis pri malsaĝa persono, kiel mi. »

— « Berto, interrompis sinjoro Meral, kiel ci povas tiel piketi junulon, kiu sin tute dediĉis al la plenumo de ciaj kapricoj ? »

Berto, per aminda gesto, etendis la manon al sia fianĉo, kiu ĝin kisis.

— « Mi esperas ke sinjoro Paŭlo pardonos min, kaj, sen venĝemo, profitigos min per sia nove akirita saĝeco. Kion do interesan diris via sovaĝa majstro ? »

— « Mi apenaŭ kuraĝas diri, fraŭlino. Li pretendis ke estas nebone kiam virino nenion amas, krom sia edzo. »

— « Vere », ridis Berto. « Ne timu ; krom vi, mi amos ankaŭ la balon. »

Paŭlo surpriziĝis.

— « Ĉu, » li pensis, « ĉi tiun fojon, estos mi kiu jaluzos ? »

Sed, foriginte tiun malagrablan impreson, li ĝentile rediris :

— « Sed mi ankaŭ amas la balon. Ĉu tiele ni plenumos la kondiĉon celatan de mia urso ? Tamen, mi estas certa ke, ĉu prave, ĉu malprave, ni estos feliĉaj. »

Kaj li direktis al la junulino, aman rigardon, kiu kortuŝis ŝin, kaj iom ruĝigis.

Ridante, sinjoro Meral konkludis :

— « Tiel estu ! »



Digitized by 

Original from
HARVARD UNIVERSITY


EN MONTOJ

ALVOKO DE MONTANO

Ci, kiu laciĝis de l'urba bruado,
Ĉi tien alvenu. Ĉe nia altaĵo,
La voĉo vespera de l'monta preĝejo
Alverŝos
Freŝigan ripozon.

Nun iru pli supren. Senmovaj larikoj
Fiere radias per rektaj branĉetoj.
Sed Alpa venteto, sur ilin glitante,
Sonoros
Murmuran muzikon.

Pli supren ankoraŭ ; ĝis kiam ci marŝos
La landon misteran de l'mutaj ŝtonegoj.
Nun haltu. Ci tie, l'orelon streĉante,
Ekaŭdos
Vibrantan ĉielon.



KANTO DE MONTA PINO

Vivon ne dolĉan, ĉi tie mi vivas ;
Sed min neniam forlasas kuraĝo.
Por anstataŭi la teren falintajn,
Novajn obstine naskanta foliojn,
Brave mi vivas !

Daŭras, ĉi tie, la vintra batalo ;
Kaj, de la neĝo ŝarĝitaj, la branĉoj
Tiel pezigaŝ, ke ŝvito rezina
Sur min elfluis, kaj larĝe firmiĝis.
Pene mi vivas !

Suno somera, en pura ĉielo,
Varme radias; kaj mia brulita
Trunko ruĝiĝis, skvamforme fendigis.
Sed, en la lumo levanta la branĉojn,
Goje mi vivas !

Ofte ventego alkuris muĝanta ;
Sed mi, prenile, per kurbaj radikoj,
Kontraŭ atako, ekkaptis la rokon ;
Kaj la ventegon mi staras venkinta !
Supre mi vivas !




MALGRANDA FLORETO

Malsupre la florajn herbejojn lasinte,
De longe mi marŝas tra neĝaj krutaĵoj.
Mi haltu momente. Jen estas ŝtonega
Por mi ripozejo. Ho kiel mirinde !
En roko fendita,
Malgranda floreto
Elkreskis ŝirmita.

La fortoj naturaj por ĝi prilaboris ;
Ĉar, iom post iom, la vintraj neĝadoj,
En kavo tereron, de polvo faritan,
Enlasis ; kaj tiam blovanta .ventego
La semon alportis.
Malgranda floreto
De nubo ci venis.

Sed kial ci tiel belete floradas ?
Kaj kial ĉi punton folian etendas ?
Cin nek papilio, nek kisis abelo
Ĉar tian altaĵon eĉ agloj ne flugas.
Al cia kroneto,
Malgranda floreto,
Nenia rigardo.

En tiu ĉi ŝtona senmova dezerto,
Nenio, krom ni du, vivadas kaj amas.
Mi cin, unuhoran senvoĉan kunulon,
Tutkore jam amas ; kaj eble ci ĝojas.
Mi kiam foriros,
Malgranda floreto,
Ci sola restados !




ARBARO LARIKA

Sagoj de l'suno matena l'arbaron trakuras,
Kaj dissiritan nebulon forpelas el tero.
De la foliaj tufetoj rosguto briligas
Ĉiun fadenon.
De diamantoj pudritaj,
Glore larikoj aperas.

Estas tagmeze. Ĉe l'verda gramena tapiŝo,
Large tra branĉoj veluraj, la lumo pluvadas ;
Muŝoj zumante flugetas ; formikoj rapidas ;
Grincas akridoj ;
Sian brancaron flekseblan
Dolĉe larikoj balancas.

Ombrojn vespero longigas, ĉesigas bruetojn.
Ĉe l'okcidentaj neĝejoj, fajranta ĉielo
Ŝajnas, tra la kolonaro de l'trunkoj apudaj,
Ora kurteno.
Kvazaŭ naĝantaj en brilo,
Pace larikoj ekdormas.

Supre, la nokto densiĝas, sennombre fajrera ;
Kaj la arbaron eniras malhela mistero.
Ĉio silente ŝtoniĝas ; ec, nune senmova,
Dormas l'aero.
Sed jen mallaŭta murmuro !
Eble larikoj revadas.




FULMOTONDRO

Maltrankvila kviĉto la nokton pezigas,
Kaj l'aero malhela atendas senspire.
L'horizonton subite briligis lumajo ;
Kaj, sur fundo flamanta, la nigraj kulmenoj
Ekaperas,
Minacante.

Jen sur monto sin ĵetas amaso pluvega.
Sub frapado, la rokoj tintetas, kaj akvon
Ventumile reĵetas, en densaj garbetoj.
Riveretoj sennombraj, tra tera deklivo,
Serpentiras,
Bruetante.

Sur la faldoj ondantaj de pluva kurteno,
La fulmado fajrajn desegnas liniojn.
Ekbatite, la monto kolere blekegas ;
Kaj de ĝiaj kunuloj l'anaro grandega
Kunmuĝadas,
Ĥorigante.

Sed la nuboj, ŝirite en blankaj pecetoj,
Malaperas ĉielen, dum kelkaj el ili,
Sur la tero falinte, honteme forkuras ;
Kaj la monton tremantan ĝentila lunbrilo
Silentigas,
Karesante,




AKVO

Ĉe malgranda valéto, en Álpoj kasáta,
Rivereto la verdan feltajon tratranĉas.
De la neĝo proksima ĵus nove naskita,
Ĝi, pepante, rapidas sur blankaj ŝtonetoj ;
Kaj, en gaja irado, ĝentile kruela,
 Sin amuzas,
 Dronigante akridojn.

Alveninte ĉe l'bordo de kruta deklivo,
La fera torento sin ĵetas antaŭen.
En ekscito, ĝi sian kuradon akcelas,
Supersaltas ŝtonegojn, rondiras en kavoj,
Kaj, freneza pro ĝojo, ĝi garbojn da ŝaŭmo
 Elŝprucigas,
 Albojante la rokojn.

Al malsupro rulante, potenca rivero
En teraĵo laŭvolan trafosas irejon.
Ĉe la fundo de sia fluaĵo kristala
Ĝi plaŭdantan amason da ŝtonoj kuntrenas ;
Kaj, en valo, senĉese, majesta muĝado
Sin malvolvas,
Bruigante la montojn.

Sed nun estas finita libera vivado.
Tra la sklavaj kamparoj, ĝi puŝas malgaje
Lacigitajn ondegojn, kaj iras silente ;
Ĝis, en maro, ĝi trovos la finon de ĉio.
Sed ne vere ! Ĝi tiam, de l'suno vokita,
Vaporiĝas,
Enirante ĉielojn.



NEĜO

Jen la neĝo ! Jen tempo por lúda batálo ! »
Kunekkrias infanoj. « Ni baldaŭ starigos
Konstruaĵojn mirindajn ; kaj kiom amuze
Sur glitiga deklivo rapide deflugi ! »
Kaj, kun ĝoja miĝo, ĉi tiuj etuloj,
Interese, malvarman lanugon atentas.


Rektirante,
Rondirante,
La neĝeroj amase kunflirtas.

« Jen la neĝo ! Finitaj la kampaj laboroj !
Komencigas la vintro vilaĝan kunvivon.
Sub arkaĵo de stalo, en varmo de brutoj,
Babiladaj kunvenoj vespere revenos ;
Kaj rakontos spritulo, dum ŝpinos virinoj. »
Alrigardas montano revade la neĝon.

Rektirante,
Rondirante,
La neĝeroj amase kunflirtas.

« Jen la neĝo ! Malvarma kaj pena sezono ! »
Maljunuloj, ĉe l'pordo sidante, sopiras.
« Ĉu ni vidos ankoraŭ la verdan tapiŝon ?
Ĉar, por tiom da tempo, la lando sin kovris ;
Kaj la blanka mantelo, de supre falanta,
Forpuŝita nur estos sur loko tombeja ! »
Rektirante,
Rondirante,
La neĝeroj amase kunflirtas.

Jen la neĝo ! Nenio nun estas videbla
Por okuloj ŝlositaj en blanka ĉambreto.
Sed, ĉi tie, silenta kaj dolĉa lumajo
Kvietigas l'animon, esperon alportas ;
Ĉar la neĝo, sorbinte la pacon eternan,
En plej alta ĉielo, ĝin verŝas sur teron.
Rektirante,
Rondirante,
La neĝeroj amase kunflirtas.




FORLASITA VOJO

En la pasinto ĉi tiun deklivon
Vojo trapasis : sed, ĉar de torento
Ofte trancita, ĝin oni forlasis.
Nune aliu alien surrampas.
Iam, ĉi tie, ponteto ceestis ;
Restas ankoraŭ nur unu mureto.
Kiu, maljuna, sub griza likeno,
Tamen fortika, sur sultroj masivaj,
Portas nur blankan de sedo * bukedon.
Iam, ĉi tie, barilo de stangoj,
Kontraŭ brutaro, defendis kampeton,
Kiun, en kavo, montano nivelis.
Tie kutimis malmultaj grengarboj,
Inter ŝtonetoj, somere sekigi.
Granda laboro, malgranda profito ;

* L. sedum album.

Sed la montano obstine penadis.
Fine li mortis. Forlasis la kampon
La posteuloj ; la monto ĝin prenis ;
En ĝi lavandojn amase kreskigis.
Tia ĝardeno paŝanton mirigus.
Kial, li pensus, en loko dezerta
Tiu ĉi stango, kuŝante sur fostoj ?
Iam, amiko, la homa laboro
Paŝis ĉi tie ; vidiĝis en polvo
Suaj najlkapoj aŭ ŝafaj hufetoj ;
Sed, sur la vojo, hodiaŭ mortinta,
Sovis la monto gramenan morttukon.
Dolca nun kuŝas irejo por ombroj !



APUD TORENTO


Iam ŝtonego, de monto skuita*,
Ĝis en torenton, pezege derulis.
Kontraŭ la baro, la fluo kolera
Turnis rondire, la teron elfosis;
Fine, ĝi pelvon kavigis profundan.
Tiam, kontenta de sia farado,
En ĝi, la lakte ŝaŭmanta torento,
Kiel aero, transpara** fariĝas,
Travidebligas malgrandajn ŝtonetojn,
Kies diverse miksitaj koloroj,
Per mozaiko la kuvon beligas.

(*) Mi intencas diri « ŝtonego kiun monto skuis », kaj ne :
« ŝtonego de monto kiu estis skuita », nek ankaŭ : « ŝtonego kiu derulis
de skuita monto ». Bedaŭrinde estas ke la prepozicio *de* havas tiom
da nesimilaj sencoj. Oni proponis enkonduki en esperanton du novajn pre-
poziciojn *di* kaj *daŝ*. Ekzemple oni skribus : Sekvata, daŝ monto, de aro
di bovinoj.

(**) *transpara* = tra kiu oni povas vidi. A. F. transparent. G.
durchsichtig. H. I. trasparente.

Tie, la fluo, lacante de kuro,
Ĝoje, en brilo, momente ripozas.
Sur la sablaĵo, ĉe l'fundo kuŝanta,
Pro refraktiĝo de l'suna lumado
Tra la sulketoj de l'movo supraĵa,
Strioj, alterne aŭ grizaj aŭ brilaj,
Kiel ridetoj, rapide surglitas.

Ĉu de l'feliĉo ne ĝusta imago ?
Kelkaj sekundoj transparentaj kaj helaj
Inter ŝaŭmaĵoj de l'homa kurado.



DECIVO

Sidas junulo sur kruta kulmeno.
Meze de nuboj, li perdis la vojon.
Al la vualo ĉiela la neĝo
Ĉirkaŭkuniĝas, je kelke da paŝoj.
Nigraj sur blanko, du rokoj starigas
Pardon, tra kiu, en stranga kurado,
Unu l'aliun sekvante,
Pasas, en vento, nuberoj.

Li sin, de longe, demandas ĝis kiam,
Daŭros ĉi tiu sekvado senfina :
Kaj sur l'aliun deklivon glitigan
Fikse rigardas. Anksie li pensas :
Ĉu esperata jen estas la vojo ?
Ĉu nevidebla atendas abismo ?
Unu l'aliun sekvante,
Pasas, en vento, nuberoj.

Bluo kelkfoje tra truo vidiĝas,
Baldaŭ kaŝita de nubo ĵaluza,
Kiu, pli dika, dum sia pasado,
Malaperigas la rokon kontraŭan :
Kaj la junulon invadas* malĝojo.
Kial ne povas li flugi kun ili ?
Unu l'aliun sekvante,
Pasas, en vento, nuberoj.

Ĉar proksimiĝas jam al li la nokto,
Al nevenkeblo li devas nun cedi.
Reen, la siajn postsignojn en nego
Honte sekvadi, permeso nur estas.
Al la kurteno de l'nigra pordego,
Lastan li ĵetas bedaŭran rigardon.
Unu l'aliun sekvante,
Pasas, en vento, nuberoj.

Tiel, tro ofte, esperon de l'homo
Trompas la sorto. Kuraĝe li grimpis,
Kaj proksimiĝis al celo : sed kiam
Paŝo, la lasta, jam estas farota,
Tiam li sentas ke mankas flugiloj.
Malsupreniri li devas, konscia,
Ke la danĝeron kaŝante,
Pasis, en koro, revadoj.

(*) *invadi* L. I. invadere. A. invade. G. einfallen. F. envahir. H. invadir.

